

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

100-a jaro • n-ro 1205 (7-8) • Julio-aŭgusto 2007

Printempa Malferma Tago en Roterdamo

fariĝis somera Esperanto-aranĝo



**Malferme
al la mondo**

**Prelegturneoj
en Eŭropo**

**Kalendaro
2007 – 2008**

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:
Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
revuo@esperanto.sk

Aperas:
en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:
la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 36);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,50.

Anoncarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ uea@co.uea.org

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

- 147 ... Malferme: al la mondo kaj ne nur al ni mem (Renato Corsetti).
- 148 ... Printempa Malferma Tago en somero (Osmo Buller).
- 149 ... Prelegturneoj en Eŭropo: kiam kluboj kaj individuoj sin prezentas (Maritza Gutiérrez González).
- 150 ... Loke-Fake-Persone: Ĉinio (Wu Guojiang), Brazilo. Vasilij Eroŝenko. Mojajev. Belgio (Amri Wandel). Kongresa statistiko.
- 151... Filmoj. Pakistano (Jawaid Eahsan). Kubo. Litovio (Povilas Jegorovas). Kongresejo Esperanto (Ulrich Matthias). Thorsen-apogo je dispono de bibliotekoj.
- 152 ... En kio similas Hispanio kaj Ĉinio? (Augusto Casquero).
- 153 ... Kalendaro 2007–2008.
- 156 ... La nova IKU-Libro pretas (Amri Wandel).
- 157 ... Spezokonto de UEA por la jaro 2006.
- 158 ... Katalin Kováts pri *Jazyk Esperanto za odin mesjac. Samoučitelj' razgovornogo jazyka. Elementarnaja grammatika jazyka esperanto. 500 samych vajnyh slov jazyka esperanto. Strana Esperantija – Karmanaja enciklopedija.*
- 159 ... Paul Gubbins pri *Esperanto elektronike*. Don Broadribb pri *La lupino kaj aliaj rakontoj de Saki.*
- 160 ... Ionel Oneț pri *Ksenofobia gvidlibro al la italoj*. Miko Sloper pri *Meven. Bretona Esperanto-koruso kaj Ondumoj tra la mond'.*
- 161 ... Laste aperis.
- 163 ... Oficiala Informilo. Jarlibro 2007 aperis.
- 164 ... 100 jaroj de Esperanto en Slovakio (Peter Baláž). La 9-a Tago de Pioniro (Kim Uson).
- 165 ... AKEL-2: Renkontiĝo en Bulgario (Genovaité Liepinia).
- 166 ... Forpaso. Anoncetoj.

KOVRILPAĜE: Komence de junio la CO de UEA en Roterdamo spertis multnombre vizitan Malferman Tagon (legu sur la p. 148). Foto: Stano Marček

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (Ĝenerala planado, eksteraj rilatoj, informado): D-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39 06 957 57 13; ✉ +39 06 957 66 33; ✉ renato.corsetti@esperanto.org.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio; ☎ +352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala sekretario: S-ino Ulla Luin, Mygdalsvägen 123, SE-135 42 Tyresö, Svedio; ☎ +46 (0)8 712 82 91; ✉ ulla.luin@esperanto.org.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎/✉ +31 (0)20 642 18 53; ✉ anstenhagen@hotmail.com.

Azia Agado, Amikoj de Esperanto: S-ro Yu

Tao, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio; ☎/✉ +86 (0)10 68995946; ✉ yu-tao@china.com.

Faka kaj scienca agado: Prof. Amri Wandel, N-ro 767, IL-71908 Makabim, Israelo; ☎ +972 (0)8 926 44 62 (h); +972 (0)2 658 68 60 (of); ✉ +972 (0)2 658 44 61; ✉ amri@huji.ac.il.

Landa kaj Regiona Agado: S-ino Maritza Gutiérrez González, Avellaneda 212, e/ Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana, Kubo; ☎ +53 (7) 539201 (h); +53 (7) 404484 (of); ✉ +53 (7) 338729; ✉ mgglez@enet.cu.

Observanto de TEJO: S-ro Chuck Smith.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

Speciala komisiito pri informado: D-ro Jukka Pietiläinen, Soidintie 8 E 28, FI-00700 Helsinki, Finnlando; ☎ +358 (9) 8036149 (h); ✉ +358 (3) 215 6248 (of); ✉ jukka.p@esperanto.fi.

Malferme al la mondo kaj ne nur al ni mem

Ĉu Esperanto ankoraŭ havos funkcion en la morgaŭa mondo? Ĉu Esperanto ne estas preterpasita de la tempo? Ĉu ĝi ne restas unu el tiuj sindonaj utopioj de tiu mirinda periodo de espero, kiun la eŭropanoj travivis dum la fino de la 19-a kaj la komenco de la 20-a jarcento? Ĉu nun la mondo ne estas esence malsama ol ĝi estis tiam? Kie estas la tiamaj idealoj de frateco, homa interhelpo, tutmonda paco?

Se oni rigardas ĉirkaŭe oni vidas nur timojn pro la fino de la planedo mem, kiun varmo kaj aliaj veteraj okazaĵoj ŝajnas anonci. Oni vidas nur civilizojn, kiuj atakas civilizojn kaj pretigas armilojn ĉiam pli timindajn kontraŭ imagitaj estontaj malamiko. Oni vidas la ideojn de efikeco multege plipezi kompare al la ideoj pri socia solidareco. Oni vidas, ke la tuta retoriko pri helpo al disvolvo de la ekonomie malriĉaj landoj montras sian veran vizaĝon: retoriko kaj nenio alia.

Ĉu en ĉi tiuj kondiĉoj estas ankoraŭ loko en la mondo por Esperanto? Mi senhezite respondas per granda jeso.

Efektive la popolo de Esperanto ĉiam kapablis adapti sin al la ŝanĝigantaj mondaj kondiĉoj dum la pasinta jarcento, kaj ankaŭ nun ĝi montras sian kapablon. Unuflanke niaj gejunuloj trovas solvojn ĉiam pli efikajn por enmeti la internacian lingvon en la plej modernajn komunik-rimedojn. Aliflanke multiĝas kongresoj universalaj kaj neuniversalaj en multaj partoj de la mondo, kie ili ne tiom ofte okazis antaŭe. Multiĝas kongresaj temoj kun tut-tera signifo, kiel tiu de la ĉi-jara Universala Kongreso: *Okcidento en la oriento: akcepto kaj rezisto*.

Esperanto estas nun vokata ludi sian pontan rolon je monda skalo. Inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Marco kunvenis ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Tion scias ĉiu komencanta esperantisto. Hodiaŭ ni estas vokataj realigi kongresojn, en kiuj kunvenas ne francoj kun ĉinoj, ne usonanoj kun irananoj, ne rusoj kun araboj, sed homoj kun homoj. Alivorte Esperanto estas vokata ludi sian pontan rolon ne nur en Eŭropo sed inter la malsamaj kultur-regionoj de la mondo, la eŭropa, la islama, la orient-azia ktp.

Se ni ne faras tion kaj insistas parnasisme okupiĝi pri la grandaj malsamecoj inter la hungara kaj la skota skoloj, aŭ okupiĝi ĉefe pri la problemoj kunmeti polojn kaj germanojn, ni estos preterpasataj de la mondo. En la mondo la grandaj problemoj nun estas ne la rivaleco inter Germanujo kaj Francujo sed la rivaleco inter Ĉinujo, Hindujo, la islamaj landoj, Usono (kaj Eŭropo, kiu deklaras sin parto de ĝi), Afriko ktp. En ĉi tiu mondo de rivalecoj Esperanto devas porti sian kontribuon por faciligi la dialogon inter homoj de bona volo apartenantaj al la malsamaj grupoj. Tiel ĝi konservos sian signifon kaj eĉ pliiĝos ĝin.

La politiko de Esperanto en nur unu kontinento jam ne plu estas ebla. Bonŝance! Tio ne signifas, ke oni ne luktas en sia kontinento por Esperanto, eĉ male, laŭ la devizo: pensi tutmonde kaj agi loke. Ni, tamen, konsciu, ke Esperanto jam iĝis, aŭ almenaŭ estas iĝanta, ponto inter ĉiuj mondaj regionoj, kaj ni helpu tiun procedon.

Renato Corsetti



Printempa Malferma Tago en somero

Kun pli ol 90 vizitantoj el 15 landoj la Centra Oficejo de UEA spertis nekutime multnombre vizitatan „printempan“ Malferman Tagon sabaton, la 2-an de junio.

Pro la rekonstruado en la oficeja domo tiu ĉi aranĝo, organizita jam por la 26-a fojo, okazis pli malfrue ol kutime kaj fariĝis fakte somera Esperanto-aranĝo.



(sur la supra maldekstra foto), kiu elektis iom provokan temon por sia dufoje prezentita prelego: „Ĉiuj neesperantistoj estas afaziuloj“. Lucas Vignoli Reis, vojaĝanta „ataŝeo“ de Brazila Esperantista Junulara Organizo, prelegis kun sonaj kaj bildaj specimenoj pri la muziko de sia lando. Yves Nevelsteen kaj Petro Baláž enkondukis la publikon en la retan enciklopedion *Vikipedio*.

Kiu volis konatiĝi kun *Vikipedio* pli profunde, povis poste ĉeesti praktikan demonstron kiel uzi kaj kunredakti ĝin.

La tutan tagon estis ankaŭ montrataj Esperanto-filmoj. Surpriza aldono al la programo estis la flamenka versio de „La espero“ fare de Solo.

La plej furora libro dum la Tago estis la ĵus aperinta „Afero de espero: Konkiza historio de la Esperanto-movado en Afriko“ de Heidi Goes, kiun la aŭtorino mem prezentis kadre de la programo (sur la supra dekstra foto). „Afero de espero“ vendiĝis en 17 ekzempleroj.

Malkovrinte, ke la Libroservo de UEA (la dua foto sube) ankoraŭ posedis 15 ekz. de „Maks kaj Moric“,



germana ŝatanto de tiu infanlibra klasikaĵo tuj aĉetis la tutan stokon tiel certigante al ĝi surprizan duan lokon.

De „Vikipedio: praktika manlibro“ estis venditaj 9 ekz. kaj de la ĉiam populara lernolibro „Saluton!“ 6 ekz.

Po 5-ekzemplere vendiĝis „Lingvo kaj popolo“ de Humphrey Tonkin, „Ĵim la migrulo: aventuroj de juna leopardo“ de S. Stampa kaj la nova poemaro de Jorge Camacho „Eklipsas“. Entute la Libroservo vendis librojn kaj aliajn varojn por 2054 eŭroj.

La venonta Malferma Tago de la Centra Oficejo okazos sabaton, la 24-an de novembro 2007.

Osmo Buller

fotoj: Stano Marček

Nekutima estis ankaŭ la scenejo por prelegoj kaj aliaj programeroj. Anstataŭ la nova konferencejo de la CO la programo disvolviĝis en la oficistaj laborĉambroj de la unua etaĝo, kies rekonstruado finiĝis tiel lastmomente, ke la oficistoj ne havis tempon por reveni al siaj kutimaj lokoj el la konferencejo, kien ili estis evakuitaj por la daŭro de la konstruado. La ĉefa gasto estis Claude Piron



Prelegturneoj en Eŭropo: kiam kluboj kaj individuoj sin prezentas

De la 17-a de aprilo ĝis la 8-a de majo ĉi-jare, mi ree havis la okazon prelegvojaĝi tra Francio kaj por la unua fojo en Svedio, kie mi renkontis klubanojn, aktivulojn kaj estraranojn de ambaŭ landaj asocioj.

Laŭ instigo de Claude Nourmont kaj organizo de Yves Nicolas el UFE, realiĝis dusemajna turneo al ses kluboj en la urboj Bourges, Châteaurox, Tours, Lunay, Angiers kaj Caen (Hérouville). Poste mi flugis tra Parizo al Stokholmo, vizitis Gotenburgon kaj Västerås.

Prelegoj temis pri la Esperanto-elsendoj de Radio Havano, informa servo esperantlingva de la kuba informagentejo ACN, pri Kubo ĝenerale kaj pri Esperanto lige al miaj propraj spertoj kiel enlanda estrarano kaj kiel UEA-estrarano pri landa kaj regiona agado. Partoprenis centoj da personoj inkluzive de neesperantistoj, kiuj povis mem aŭskulti Esperanton kiel komunikan ilon, el kiu sekvis traduko al la franca kaj al la sveda.

Kiel parto de la laborprogramo en ambaŭ landoj, kies kerna aranĝo estis la prelegoj ĉe kluboj kaj ĉe eksterasociaj medioj, okazis kvin radiointervjuoj, tri en Francio kaj du en Svedio. Ekzemple en Bourges oni muntis ekspozicion pri Esperanto en regiona kulturdomo, kie ĵurnalisto intervjuis min kun interpreto de Jack Le Puil. Okaze de ĉiuj prelegoj ĉiam kun interpreto al la koncerna lingvo la kluboj kunorganizis komunan aranĝon kun lokaj institucioj kaj aliaj neregistaraj organizoj ligitaj al Latinameriko, kaj al Kubo, kies membroj povis aŭskulti Esperanton vive kaj estis informitaj pri la agado de UEA kaj de la landaj organizoj. En Lunay eĉ la urbestro kaj kelkaj stabanoj partoprenis la vesperan prelegon kaj montris ke ili interesiĝas pri socikultura agado de la klubo esperantista.

Mi havis la okazon viziti la kastelon Grezijono kaj informi pri la venonta somera staĝo; viziti belajn regionojn en la centra kaj okcidenta parto de Francio, kastelojn kaj katedralojn, muzeojn kaj aliajn belaĵojn, kiuj



La sveda Radio P4 faris kun Maritza 20-minutan intervjuon. Fotoj: Wim Posthuma.

donis al mi la okazon ĝui la landon mem. Same okazis en Svedio kie mi havis tre valoran helpon de Ulla Luin, kaj sekve de ĉiuj prizorgantoj en Stokholmo, Gotenburgo kaj Västerås. En la unua mi prelegis por la klubo kaj ĉe ne-esperantista asocio ligita al grupo solidareca al Kubo, kiuj estis informitaj pri Esperanto, UEA kaj la nuntempa lingva situacio en la mondo, kio konsistigis tre interesan interŝanĝon por ĉiuj partoprenantoj.

Mia ĝenerala impresio pri la franca movado, samkiel pasintjare, tre pozitiva, kvankam ofte geklubanoj laboras iom izole tra la tuta lando, tio estas, sen vera ligo al UEA; tamen pluraj membras en la landa asocio aŭ en SAT-amikaro kaj foje en UEA. Ili tamen estas konstantaj aktivuloj por Esperanto en siaj kluboj kaj regionoj, tre bone kapablas organizi prelegvojaĝojn kaj tre ĝuas bonvenigi gastojn.

Rilate al Svedio, tiu ĉi unua kontakto ebligis al mi renkonti kelkajn estraranojn de Sveda E-Federacio kaj klubanojn de Stokholmo, Gotenburgo kaj Västerås. Ili ĉiuj, kvankam ne multnombraj, tre serioze laboras kaj por plibonigi sian sidejon en Stokholmo, por la ILEI-sekcio en Gotenburgo, kaj en la informa medio en Västerås.

La ĉi-jara prelegturneo tra Francio kaj Svedio konfirmis al mi la validecon de tiu ĉi strategia laborlinio de UEA rilate al instigo de prelegturneoj organizeblaj de landaj organizoj kaj kluboj, kiuj lige al tio sukcese kapablas mobilizi siajn homojn por akcepti gastojn, prelegontojn, allogi neesperantistan publikon kaj pere de Esperanto paroli pri diversaj temoj malferme al ĝenerala aŭskultantaro.

Mi aparte dankas al ĉiuj gastigintoj, organizintoj, tradukintoj kaj plej simplaj esperantistoj, kiuj ebligis la sukcesan okazigon de la prelegturneo en Francio kaj Svedio. Evidente, temas pri konkreta maniero prezenti la movadon, tra la kluboj kaj per agado de individuoj kiel ĉefrolantoj. Al ĉiuj elkoran dankon pro la sperto!



En la sveda urbo Västerås Maritza renkontis anojn de la loka esperantista klubo

Maritza Gutiérrez González

❖ **ĈINIO:** La jaro 2007 estas la Esperanto-instrua jaro de Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA). La Universitato Shenyang aktive reagis al tiu ĉi iniciato. La 1-an de marto 2007, la unuan tagon de la nova semestro, 600 studentoj eniris en kvar Esperanto-kursojn funkciigitajn de la universitato kaj ĝis nun neniuj forlasis tiun ĉi nedevidan studobjekton. Tiu nombro estas la plej alta en la nunaj universitatoj, kiuj enkondukas Esperanton en la provinco, kaj temas pri nova rekordo. La studentoj akiros du studpontojn se ili sukcese trapasos ekzamenon. Uzata estas la lernolibro *Esperanto-Kurso de La Nova Jarcento!*, kompilita de Prof. Liu Zhengkun kaj Prof. Song Yunsheng. **Wu Guojiang**

❖ **BRAZILIO:** La 15-an de marto 2007, Jorge Linck da Silva, estrarano de Tri-Rivera Esperanto-Klubo, prelegis ĉe Rotaria Klubo Beira Rio en la brazila urbo Três Rios. La parolado temis pri Esperanto kaj la agado de Tri-Rivera Esperanto-Klubo. La scivolemon de la rotarianoj vekis dupaĝa ilustrita artikolo pri la Internacia Lingvo en la revuo *Brasil Rotário* de decembro 2006.

Kongresa statistiko

1739 kongresanoj el 57 landoj aliĝis al la 92-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Jokohamo, Japanio, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto ĉi-jare.

Iom pli ol duono (907) venas el la gastigonta lando. Francio (91) ŝajnas jam certigi la duan lokon en la statistiko antaŭ Korea Respubliko (87). Aliaj landoj en la pinta dekduo estas Germanio (60), Ĉinio (54), Italio kaj Litovio (po 43), Rusio (34), Nederlando kaj Pollando (po 32), Usono (31) kaj Brazilo (26).

❖ **VASILIJEROŝENKO** (1890-1952) estis blinda ukraina poeto, kies verkoj aperis – originale aŭ tradukite – en Esperanto, la ukraina, rusa, ĉina kaj japana. Dum multaj jaroj li vivis en Japanio kaj Ĉinio, kie li, ĉefe dank' al Esperanto, akiris multajn amikojn, inter ili la grandan ĉinan verkiston Lusin. En sia hejmlando Ukrainio li estas ĝis nun malpli konata. Sed en aprilo ĉi-jare, sekve de la klopodoj de komitatano de UEA, Evhen Kovtonjuk, en bela ĉambro de la ŝtata Ekscim-banko en Kievo establiĝis studo-centro, kiu celas memorigi pri la vivo kaj verkaro de Eroŝenko. Aperis vinjeto kunigita kun ukraina poŝtmarko kaj medalo, dediĉitaj al li. Estis publikigita libreto *Fabeloj kaj legendoj de Eroŝenko*. La studo-centron (adreso: ab.kesto 165, UA-01001 Kiev), kiun gvidas la verkisto Vladislav Taranjuk, meze de majo kiel unua eksterlandano vizitis Ulrich Lins, germana komitatano de UEA.

❖ **MOĴAJEV:** Per komuna decido de la estraroj de TEJO kaj UEA Pavel (Paŭlo) N. Moĵajev el Ukrainio transprenos de Ĵenja Amis la redaktorecon de *Kontakto*. Ĵenja Amis estas redaktoro de la socikultura revuo de TEJO ekde 2002. Post pli ol kvinjara sukcesa kaj multe laŭdata laborado ŝi laŭgrade transdonos la respondecon al sia posteulo ĉi-jare. Paŭlo Moĵajev naskiĝis en 1981 kaj diplomiĝis en 2003 en la Krimea Ŝtata Medicina Universitato en Simferopolo, kie li nun estas instruisto pri anatomio. Kun Esperanto li konatiĝis en 2000 kaj ekde tiam aktive partoprenas la landan movadon. Ekde la jaro 2003 li okupiĝas pri provlegado de *Kontakto*, kies redaktoron li pasintjare ekhelpis kiel vicredaktoro. Partoprenantoj



de pluraj Esperanto-aranĝoj povis ekkoni ankaŭ liajn muzikajn talentojn; ekz. en IJK-oj en 2004 kaj 2005 li koncertis prezentante proprajn kantojn. Aldone, Moĵajev estas aktiva Esperanto-instruisto kaj diplomiĝis pri la Cseh-metodo. Li verkas, tradukas kaj lastatempe laboras ankaŭ super Esperanta-rusa vortaro.

❖ **BELGIO:** En la 100-jara jubilea renkontiĝo de la klubo „Verda Stelo“ en Antverpeno salutis nome de UEA la estrarano Amri Wandel, kiu prelegis dum la programa parto pri „Esperanto-agado en Israelo“ kaj rakontis pri la kunlaboro kun Flandra E-ligo por la eldono de la libro *Kosmo kaj ni*. Sur la foto: Ivo Durwael kaj Amri Wandel dum la festvespero de la jubilea kunveno de „Verda Stelo“.

Amri Wandel



✪ **FILMOJ:** Sur la TTT-ejo www.homajrajtoj.org/index.php?id=17 troviĝas 30 Esperante subtitolitaj filmetoj pri Homaj Rajtoj. Per tiuj filmoj Douwe Beerda volas atentigi pri la homaj rajtoj kaj petas vian helpon, ekzemple per publikigo de la filmetoj en diversaj retpaĝaroj (tio eblas per youtube-kodo), aŭ alimaniere konsciigi de esperantistoj pri la homaj rajtoj.

✪ **PAKISTANO:** Multana Esperanto-Rondo festis Semajnon de Internacia Amikeco, organizante vesperan kunsidon kun lokaj esperantistoj.



Dum la kunsido oni festis ankaŭ la naskiĝtagon de Jawaïd Eahsan. En la kunsido partoprenis la prezidanto Akram Rongha kun sia filino, Abid Ali Qureshi, malnovaj kaj junaj samideanoj. **Jawaïd Eahsan**

✪ **KUBO:** Kun partopreno de 125 esperantistoj el 7 provincoj realiĝis en la urbo Bayamo, en la oriento de Kubo, renkontiĝo organizita de la provinca filio de Granma, kies prezidanto estas Rafael Cabrera, kaj programita de Kuba Esperanto-Asocio. De la 18-a ĝis la 20-a de majo, la popola kampadejo El Salto de Jibacoa inundigis de Esperanto-parolantoj, kiuj ĉefrolis en varia programo de prelegoj, kulturaj kaj distraĵaj prezentoj. Okazis prelegoj pri aktualaj temoj de la Esperanta mondo kaj konversaciaj rondoj por profundigi la konojn pri la gramatiko de la lingvo. En la kultura programo prezentigis kanzonoj, humuro, kaj la muzikensemblo Zero de Bayamo fermis la vesperon per varia repertuaro, kiu inkluzivis rokmuzikon.

✪ **LITOVIO:** En la Vilna Pedagogia Universitato (ties pedagogia kaj psikologia fakultato) komenciĝis instruado de Esperanto (la unua grado) kiel libere elektebla studobjekto. Por la kurso registriĝis pli ol 40 studentoj de tiu universitato. Instruas lekciisto de la instituto pri kulturo, filozofio kaj arto en Vilno, juna esperantisto Gediminas Degesys (gedisd@yahoo.com). La studado donos al studentoj du kreditunuojn. La programo antaŭvidas ne nur rektan instruadon de Esperanto, sed ankaŭ konatigon de la studentoj kun problemoj de internacia lingvo ĝenerale, eblojn de Esperanto kiel la internacia lingvo, historion de Esperanto en la tuta mondo kaj en Litovio speciale. Estas preparita listo de rekomendata literaturo por studentoj. Ĉiuj studentoj fine de la studado devos verki referaĵon pri la temo. Temas jam pri la tria litova universitato, kie Esperanto estas instruata (la ceteraj estas la universitato de Ŝiauliai, kaj Kauna humanisma fakultato de Vilna universitato). **Povilas Jegorovas**

✪ **KONGRESEJO ESPERANTO:** Komence de majo mi devis pro profesiaj kialoj vojaĝi al la kongresejo „Esperanto“ en la germana urbo Fulda. Estis impone vidi tie la gigantajn, pli ol 10 m altajn literojn „ESPERANTO“ sur la ekstera muro de la halo, en kiu prelegis la 4-an de majo i.a. nia vickanceliero Franz Müntefering. Mi faris foton pri la halo kaj enmetis ĝin en Vikipedion: http://eo.wikipedia.org/wiki/Dosiero:Kongresejo_Esperanto.jpg. La kongresejo Esperanto estas grava ZEO, uzata kiel foirejo, kongresejo kaj koncertejo (i.a. jam por unu el la plej popularaj muzikaj elsendoj en la germana televido). Ĝi estis konstruita en 2005 kaj konsistas el Hotelo Esperanto (4-stela, kun 330 ĉambroj), Kongresa halo „Esperanto“ (kun areo de 6 400 m² kaj loko por 5 000 homoj) kaj Enira halo „Plaza Esperanto“ (liganta la hotelon kun la kongresa halo). **Ulrich Matthias**



Thorsen-apogo je dispono de bibliotekoj

Esperanto-bibliotekoj havas denove ŝancon pligrandigi siajn kolektojn, ĉar ankaŭ ĉi-jare UEA disdonos subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen.

Rajtas kandidatiĝi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Interesitaj bibliotekoj sendu priskribon pri si kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Petoj pri diskoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estos konsiderataj. Subvenciojn oni ricevos kiel librojn laŭ la listo, kiu akompanis la peton. Pasintjare sep bibliotekoj ricevis subvenciojn je la valoro de 75 ĝis 250 eŭroj.

La petoj atingu la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 2007. Krom paperpoŝte (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando), eblas sendi ilin rete al direktoro@co.uea.org.

Kun la vivo kaj agado de la Esperanta poeto Poul Thorsen (1915-2006), kiu kun sia edzino donacis la bonharon de la Biblioteka Apogo, eblas konatiĝi per la retejo www.poulthorsen.dk.

En kio similas Hispanio kaj Ĉinio?

De antaŭ unu monato mi troviĝas en la urbo Kantono, en la sudo de Ĉinio. Ekde mia alveno mi povas fermi nek la buŝon, nek la okulojn, pro admiro. Ĉio en ĉi tiu grandega lando estas impona.

Fakte se mi iel devas klarigi pri ĝi, mi simple uzos du esprimojn: „Ega“, kaj „multaj homoj“. La eŭropaj mezurunuoj tute ne validas por Ĉinio. Ekzemple, la urbo kie mi troviĝas, Kantono, havas eble 12 milionojn da loĝantoj. Kial eble? Mankas statistikoj, aŭ la loĝantoj simple ne scias. Kelkaj parolas al mi pri 15 milionoj, aliaj pri 10, kaj eĉ unu diris al mi ke 50. Fakte estas ke la laŭleĝe registritaj homoj povas esti „ĉirkaŭ“ 10 milionoj, sed loĝas tie milionoj da homoj, kiuj venas el la kamparo, el la vilaĝoj, kiuj tute ne estas kalkulitaj en tiuj statistikoj. La „kvartalo“ kie mi loĝas nomiĝas Panyu. En ĝi loĝas „nur“ tri milionoj. Kiel Madrido, pli granda ol Romo. Plena je nuboskrapuloj. Interesa miksaĵo inter la plej modernaj konstruaĵoj, belaj kvartaloj, grandegaj avenuoj, kun mizeraj stratoj (fakte por mi la plej interesaj). Restoracioj abundas, abundegas. Miloj kaj miloj. Unu apud la alia. Ĉiam malfermitaj, ofertante al la klientoj ege varian kaj buntan elekton de manĝaĵoj, ĉiaspecaj. Eblas manĝi en luksaj restoracioj por du eŭroj. Servitaj de armeo da belaj knabinoj, bele ĉine vestitaj, kiuj zorgas pri ĉiu detalo kaj bezono de la klientoj.

Pri vendejoj, vendejetoj, vendejegoj, ne eblas kalkuli. Ĉio estas tie vendata. La plej strangaj, la plej belaj, la plej riĉaj varoj. Unu apud la alia. Kio ne estas restoracio estas vendejo. Prezoj nekredeble malaltaj. Elektro nekredeble riĉa.

En kio similas Ĉinio kaj Hispanio? En multaj diversaj aferoj. Ĉefe en la karaktero de la loĝantoj. Ĉinoj havas mediteraneajn karakteron kaj kutimojn. Ili estas afablaj, babilemaj, gajaj, bonhumoraj, gastamaj, kaj ŝatas vivi nokte. Ili ŝatas esti sur

la stratoj, manĝi tie, babili tie, sidi tie, ludi kartojn aŭ aliajn ludojn tie. Ĉiam grupe. Ofte amase. La ludo estas nacia emo, malvirto. Homoj ludas dum horoj, senlace, ĝis malfrue nokte. En Pollando mi surpriziĝis kiam miaj ĉinaj gestudentoj proponis al mi: „Venu dimanĉe al mia loĝejo por ludi“. Mi ne komprenis. Pri kiu ludo ili parolis? Simple por ili „veni ludi“ estas same kiel por eŭropanoj diri: „venu dimanĉe al mia loĝejo por kafumi“, aŭ simple „vizitu min dimanĉe“.

Pri vidindaĵoj prefere ne paroli. Eblas paroli dum horoj kaj horoj. La kulturo kaj tradicioj de Ĉinio estas grandegaj. Ĉie troviĝas belaj, belegaj lokoj por viziti: ĝardenoj (vere fantaziaj), temploj (ĉefe budhismaj kaj ŝintoismaj), montoj belegaj, riveroj ege larĝaj, lagoj, antikvaj konstruaĵoj (kaj modernaj). Ĉi tie la vizitanto certe ne enuos.

Sed kio pleje plaĉas al mi estas la surstrata vivo. Ĉio estas en la stratoj. La vivo tie svarmas. La stratoj estas la plej interesa spektaklo en ĉi tiu fascina lando.

Rilate Esperanton, mi tuj havis la plezuron renkontiĝi kun multaj kaj bonaj esperantistoj, kaj en la urbo Kantono kaj en la urbo Wuhan („nur“ 10 milionoj da loĝantoj). Oni invitis min prelegi, instrueti, kaj kompreneble, manĝi kaj manĝi, kaj poste manĝi.

La Esperanta movado ĉi tie havas la samajn problemojn kiel en la cetera mondo. Malpli da esperantistoj ol antaŭe, sed pli fervoraj. La internacia lingvo por ili estas pli malfacila ol por aliaj. La strukturo kaj prononcado de la ĉina lingvo estas tute malsamaj. Pro tio havas grandan valoron la entuziasmo de la lokaj esperantistoj, kiuj spite al la malfacileco de nia lingvo, daŭre lernas kaj praktikas ĝin. Ekzemplo por ni. Kiel sciante la ĉina lingvo, ankaŭ nomata *putonghua*, aŭ *han yu*, estas la oficiala lingvo de la tuta lando. Sed en Ĉinio kunvivadas pli ol 50 naciecoj, kun propraj lingvoj kaj eĉ kun propra alfabeto. Vero estas ke al la nacio *han* apartenas 95% de la loĝantaro. Sed

krom tio kunekzistas multaj dialektoj (laŭ ili „dialektoj“, laŭ mi veraj parolataj lingvoj, kvankam skribe ĉiuj estas la samaj aŭ almenaŭ praktike la samaj). Ĉinoj de iu provinco tute ne komprenas parole la ĉinojn de aliaj provincoj. Eĉ ofte okazas ke ili ne komprenas la loĝantojn de la najbara urbo. Ekzemple en Kantono (Guangzhou) la dialekto estas *kuangtong hua*. En mia „kvartalo“ jam la homoj parolas alie ol en la centro de la urbego. Sed ankaŭ en kelkaj subkvartaloj de mia kvartalo oni parolas alie. Ekzemple en la urbo Wuhan, kie mi partoprenis E-seminaron, la esperantistoj havas gravan problemon por prononci „kvartalo“, „rivero“, „bela“. Por ili estas „kvartano“, „riveno“, „bena“. Kaj uzante la lernolibron „Junulkurso“, kies ĉefa rolulo estas iu Karlo, por ili Karlo estas Krardro, aŭ io simila.

Iom post iom mi lernas pri Ĉinio. Ĉiutage ion novan. Ĉiutage nova surprizo. Mi iom post iom klopodas digesti kion mi vidas kaj aŭdas. Espereble post la du monatoj kiuj restas al mi ĉi tie, mi iomete komprenos Ĉinion kaj ĉinojn.

Augusto Casquero



Kalendaro 2007–2008



Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidelecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la novembro numero.

Julio

01- Festo de la 50-jara Jubileo de la eduka institucio Bona Espero. ✉ Bona Espero, Alto Paraíso de Gojás, BR-73.770-000, Brazilo. ✉ bonaespero@terra.com.br.

01-14: 55-a SET Lančov (Somera Esperanto-Tendaro) en Ĉeĥio. 1-a etapo. ✉ Pavel Sittauer, Hartmanova 1128, CZ-67401 Třebíč, Ĉeĥio. ✉ www.set-lancov.cz/; podhradska@volny.cz.

02-06: Praktika Metodika Semajno. Prezento de instrumentoj, observado de instrueroj, instruado en la praktiko, kun gvido de spertaj E-instruistoj, trejnado helpe de Edukado.net en Herzberg, Germanio. ✉ ICH, Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz. ☎ +49/(0)5521-5983. ✉ www.ic-herzberg.de/; esperanto-zentrum@web.de.

02-09: Renkontiĝo ĜEMELO por esperantistoj el ĝemelurboj de Kievo (Ukrainio) en apudkieva ripozejo kun 3-litaj ĉambroj. ✉ www.espero.kiev.ua/index.files/Page546.htm.

05-08: 66-a Hispana Kongreso de Esperanto kaj 12-a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Palos de la Frontera (Onubo), Hispanio. ✉ www.esperanto.es/hefesperanto/index.php?ption=com_content&task=view&id=25&Itemid=48; augustocasquero@gmail.com.



07-14: Staĝoj en kastelo Grezjono, Francio. 1-a grado: Carlo Bourlot, Italio; 2-a grado: Jean-Luc Kristos, Francio; 3-a grado: Steve Wagenseller, Usono; AA: Franjo Lévêque-Provost. ✉ Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezjono, FR-49150 Baugé, Francio. ☎/respondilo: (+33) 241 89 10 34. ✉ <http://gresillon.org/>; kastelo@gresillon.org.

07-15: Pilgrimado Budapest-Egerszálók (perpieda). ✉ HU-1029 Budapest, al. E. Szilágyi 17. III/33. ✉ rajnai@freemail.hu.

08-13: 42-a Brazilia Kongreso de Esperanto en Rio-de-Janeiro, Brazilo. La 100-jara jubileo de Brazilia Esperanto-Ligo. ✉ Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, Rua Senador Dantas, 117 S/1341, BR 20031-201 Rio de Janeiro - RJ, Brazilo. ☎ (21) 22406119. ✉ www.aerj.org.br; bke42@hotmail.com; aerj@hotmial.com.

09-27: NASK – Nordamerika Somera Kursaro en la Universitato de Kalifornio ĉe San Diego. Meza kaj supera kursoj kun Paul Gubbins kaj Lee Miller. La temo de la supera kurso: *La vivo kaj verkoj de W. Auld*. ✉ Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive

SW, Olympia WA 98512, Usono. ☎ (360) 7544563. ✉ eddyellen@aol.com.

10-14: Staĝo en Kvinpetalo, Francio. Duagrada Kurso: Praktikado kun Liliane Bon. ✉ Kvinpetalo, Esperanto-Centro, Rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. ☎ +33 (0)5 49 42 80 74. ✉ www.kvinpetalo.org/indexU.html; informoj@kvinpetalo.org.

13-28: SOMERE – Somera mezeŭropa renkontiĝo en Jünkerath, Germanio. ✉ EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wicelstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. ☎ +49-30-685 58 31. ✉ somere5@esperantoland.org.

14-20: Internacia Esperanto-Konferenco en Pazarĝik, Bulgario. Ĉeftemo: *Mitoj kaj legendoj*. ✉ Eric Lauber, 1 rue Louis-Antoine de Bourgainville, FR-78180 Montigny-Bx, Francio. ☎ +1 30 96 67 91. ✉ kasisto@osiek.org; <http://osiek.org>.

14-21: Staĝoj en kastelo Grezjono, Francio. 1-a grado: Justine (Lala) Ralalarisoa, Malagasio; 2-a grado: Rodica Todor, Rumanio; 3-a grado: Romano Bolognesi, Italio; AA: Franjo Lévêque-Provost/Jean-Luc Kristos. ✉ Kastelo Grezjono (v. 10 jul).



14-22: 43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-43) en la nordlitovia urbo Šiauliai. ✉ Litova Esperanto-Asocio, p.k.167, LT-44287 Kaunas, Litovio. ☎ +370-37-208503, ✉ +370-687-12219, ✉ +370-37-228616. ✉ litova.ea@mail.lt.

15-22: Internacia skolta Esperanto-tendaro en Doktorce, 30 km sude de Bjalistoko, ĉe la rivero Narew, Pollando. ✉ Komenda Białostockiej Chorągwi ZHP, ul. Pałacowa 3/1, PL-15-950 Białystok kun Skolta Esperanto-Ligo, Fondumo Zamenhof kaj Bjalistoka Esperanto-Societo. ✉ Jarosław Parzyszek, ✉ parzyszek@tlen.pl.

15-22: Renkontiĝo de Amikoj (RA - 5) ĉe la lago Bajkal. Bona eblo por vojaĝantoj al IJK kaj UK. ✉ www.ra.nsk.ru/; Katerina Arbekova ✉ katka@dali.cis.ru.

15-28: 55-a SET Lančov (Somera Esperanto-Tendaro) en Ĉeĥio. 2-a etapo. ✉ SET Lančov (v. 01 jul).

16-20: Staĝo en Kvinpetalo, Francio. Kvargrada Kurso kun Michel DucGoninaz, Janine Dumoulin, Yannick Dumoulin kaj Serge Sire. ✉ Kvinpetalo (v. 10 jul).

16-21: Somera Ukrainio – piedmarŝo de Odeso, Ukrainio, suddirekte tra la Odesa regiono. ✉ Ihor Glagolevskij. ✉ iglagol@ukr.net.

16-22: SPR! – SenPrograma Renkontiĝo. Internacia tendumado en Callosa d'en Sarrià, ĉe la rivereto Algar, suda Katalunio. ✉ www.esperanto.cat/e/index.htm.



19-25: 20-a Internacia Junulara Semajno en Hungario, en la urbo Tab (apud la lago Balatono). Temo: *Feliĉan naskiĝtagon, IJS!* ✉ Hungara Esperanto-Junularo, Pf. 87, HU-1675 Budapeŝt, Hungario. ✉ www.ijs.hu/; ijs@ijs.h. Senpaga/duonpaga partopreno por 2 personoj pere de Premio Melinda: ✉ www.esperanto.hu/eventoj/melinda.htm.



21-27: Somera Lernejo de Esperanto – Slava Esperanta Studado – SES en Altaj Tatroj, en Hotelo Esperanto, Pribylina, Slovakio. ✉ SKEJ, Slovaka E-Junulara Asocio, Geologická 1/C, SK-821 06 Bratislava 2, Slovakio. ☎ +421 902 203369 (Peter Baláž). ✉ skej@esperanto.sk; www.esperanto.sk; www.vysoketatry.com/esperanto.html.

21-28: Staĝoj en kastelo Grezjono, Francio. 1-a grado: anoncota; 2-a grado: Steve Wagenseller, Usono; 3-a grado: Aurora Bute, Rumanio; AA: Elizabeth Gury-Oberthur; AA: Marie-France Menanteau. ✉ Kastelo Grezjono (v. 07 jul).

21-28: 18-a Ekumena Esperanto-Kongreso, 60-a kongreso de IKUE, 57-a kongreso de KELI kaj 8-a Junulara Ekumena Esperanto-Tendaro en Pelplin, Pollando. ✉ Eduard Kozyra, Strzelnicza 8, PL-83-130 Pelplin, Pollando. ✉ esperanto@powiat.malbork.pl.

21-28: 80-a SAT-Kongreso en Antony (suda pariza ĉirkaŭurbo). ✉ Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), 67 av. Gambetta FR-75020 Paris. ☎ +33(0)1 47 97 87 05, ✉ +33(0)14797 7190. ✉ www.satesperanto.org/SAT-Kongreso-2007-Parizo-.html.

21-28: Somera Esperanto-Familia/Feria Tendaro en tendejo C-86 ĉe Thomsdorf, sud-oriente de Carwitz, Germanio. ✉ René Philipp, ✉ thustulimu@web.de; www.esperanto-nb.de/seft/seft_eo.html.

22jul-04aŭg: 29-a Renkontiĝo de Esperantaj Familioj (REF) en Nagyvisnyó, inter la urboj Eger kaj Miskolc, en Hungario. ✉ Vas-Szegedi Julianna, Kismuhi u. 5. III/12, HU-5350 Tiszafüred, Hungario. ☎ +36-70-4501688. ✉ <http://familioj.komputilo.org/REF/2007/index.html>; j1969@vipmail.hu.

23-27: Esperanto-kursoj (elementa kaj por progresantoj) en la Popola Instituto de Valamo, Heinävesi, Finnlando. Eblo kunvojaĝi ŝipe al festivalo Arta Lumo. ✉ Esperanto-Asocio de Finnlando, Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, FI-20100 Turku, Finnlando. ☎ +358-2-2305319. ✉ www.esperanto.fi; cafssekretario@esperanto.fi.

25 jul-05 aŭg: 16-a MELA (Memzorga Lag-umado) en Délegyháza, Hungario. Libere sen aŭ kun vestaĵoj ripozi, akvo- aŭ ŝlimbaniĝi. ☎ Laca +36-30-2097864, Andri: +36-30-2752068. ☐ www.krokodilo.de/mela/mela.php; DL8oap@gmx.net.

27-30: Landa Kongreso de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko en Tijuana, Meksiko. La temo: *Internacia kunlaborado*. ☐ <http://esperanto-usa.org/elna@esperanto-usa.org>.

27 jul-01 aŭg: Festivalo Arta Lumo, Kuopio, Finnlando. Multflanka kultura aranĝo kun bonaj muzikistoj, verkistoj kaj aliaj artistoj en ĉarma ĉelaga urbo. Antaŭlekturso al la monaĥejo Valamo, de kie ŝipvojaĝo al Kuopio. ☐ Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. ☐ www.esperanto.fi/; ArtaLumo@esperanto.fi.



28 jul-03 aŭg: Internacia Junulara Kongreso en Hanojo, Vjetnamio. Temo: *Paco, kunlaboro kaj disvolvigo*. ☐ www.tejo.org/ijk/; <http://aktivulo.com/ijk/>; oficejo@tejo.org; ijk@tejo.org.



28 jul-04 aŭg: 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Maribor, Slovenio. ☐ Esperanta societo Maribor, Maistrova 5, SI-2000 Maribor, Slovenio. ☐ www.esperanto-maribor.si/; eeu.kongreso@gmail.com.

28 jul-04 aŭg: EIK, Eŭropa Infana Kongreseto dum EEU-Kongreso apud Maribor, Slovenio. ☐ (v. supre).

28 jul-04 aŭg: Staĝoj en kastelo Grezjono, Francio. 1-a grado: Carlo Bourlot, Italio; 2-a grado: Svetlana Smetanina, Rusio; 3-a grado: Renée Triolle, Francio; AA: Steve Wagenseller, Usono. ☐ Kastelo Grezjono (v. 07 jul).

28 jul-11 aŭg: 2-a SALO (Somera Arbara Lernejo). Internacia E-feriĝado por gejunuloj en kaj ĉirkaŭ Herzberg, Germanio. ☐ ICH (v. 02 jul).

29 jul-08 aŭg: 55-a SET Lančov (Somera Esperanto-Tendaro) en Ĉeĥio. 3-a etapo. Familia ripozado kaj seminario. ☐ SET Lančov (v. 01 jul).

30 jul-04 aŭg: Staĝo en Kvinpetalo, Francio. SAT-postkongreso: Vivo kaj verkaro de Lanti kun Markov-familianoj. ☐ Kvinpetalo (v. 10 jul).

aŭgusto

04: Solena renkontiĝo de eksaj tendaranoj kaj amikoj okaze de la 55-a Esperanto-tendaro en Lančov, Ĉeĥio. ☐ SET Lančov (v. 01 jul).



04-11: 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo, Japanio. La temo: *Okcidento en oriento: akcepto kaj rezisto*. ☐ UEA (v. la kolofono). ☐ hwww.k4.dion.ne.jp/~uk2007/.



04-11: 38-a Internacia Infana Kongreseto, IIK 2007 en Esperanto-Domo Jacugatake, Japanio. ☐ Bert Schumann, 9 rue Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné, Francio. ☎ +33-299836986. ☐ <http://bertosch.free.fr/iik2007/index.html>, bert.schumann@free.fr.

04-11: Staĝoj en kastelo Grezjono, Francio. 1-a grado: Sabine Trenner, Germanio; 2-a grado: Svetlana Smetanina, Rusio; 3-a grado: Nina Korjenskaja, Francio; AA: Marie Savary. ☐ Kastelo Grezjono (v. 07 jul).

05-10: Vartejo por infanoj dum la UK en Jokohamo, Japanio. ☐ bertox@free.fr.

06-15: 3-a Esperantologia Fakultato en Ĉaudefono (La Chaux-de-Fonds). ☐ Kultura Centro Esperantista, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svisio. ☎/☐ +41(32)9267407. ☐ kce@esperantio.net.

07-14: Muzika staĝo en Kvinpetalo, Francio, kun Markov-familianoj. ☐ Kvinpetalo (v. 10 jul).

11-17: Internaciaj Renkontiĝoj en Plouezec, Francio. Plouezec-Esperanto, 5, Hent Toul Broc'h, FR-22470 Plouezec, Francio. ☎ +33(0)698495982. ☐ www.babelo.org/plouezec@gmail.com.

11-18: Staĝoj en kastelo Grezjono, Francio. 1-a grado: Rafael Mateos, Hispanio; 2-a grado: anoncota; 3-a grado: Nina Korjenskaja, Francio; AA: Nina Korjenskaja, Francio. ☐ Kastelo Grezjono (v. 07 jul).

11-18: Staĝoj en kastelo Grezjono, 2-a grado: Dominique Bertrand (Francio): seminario praktika pri enpaĝigo kaj Linukso, eĉ por komencantoj. ☐ Kastelo Grezjono (v. 07 jul).



11-19: 40-a Konferenco de ILEI en la urbo Ranzan, Japanio. ☐ Tiekio Isikawa, Tate 1-6-6-103, JP-353-0006 Siki-si, Saitama-jen, Japanio. ☎/☐ (+81) 48-474-7437. ☐ hwww.ilei.info/novajxoj/Ranzan.php; isksanjo@ffe-mansion.com.

17-19: Festa renkontiĝo Sukcena Ondo 2007 dediĉita al la 100-jariĝo de la organizita Esperanto-movado en Königsberg-Kaliningrado en Germana-Rusa Domo, organizita de Kaliningrada Regiona Esperantista Unuiĝo (KREU) kaj la redakcio de *La Ondo de Esperanto*. ☐ La Ondo de Esperanto, Kaliningrad ab. ja. 1205, RU-236039, Ruslando. ☎ +7-4012-656033. ☐ sezonoj@kanet.ru.

18-24: Somera Festivalo – Kunludo kaj kunstudu en Barlastono, Britio. 3-nivela staĝo kun eblo turismi. ☐ Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Staffordshire, ST12 9DE, Britio. ☎ +44-(0)1782-372141. ☐ eab@esperanto-gb.org.



18-25: RET-07 (Rusiaj Esperanto-Tagoj) kun la temo „Vi ne solas!“ ĉe la Azova maro apud la urbeto Primorsko-Ahtarsk, en la bazejo „Lotuso“. ☐ Georgij Kokolija, Pjaticnickoje shosse 45 - 105, 125310 Moskvo, Rusio. ☐ <http://www.stelaro.ru/>; ret-07@mail.ru.

18-25: 33-a Internacia Semajno de Esperanto en Sète, apud Montpellier, suda Francio. Plurnivelaj kursoj, 100m de mediteranea plaĝo. ☐ Esperanto, Kulturo kaj Progreso, 10 impasse école J.Ferry, FR-34290 Servian, Francio. ☎/☐ +33 (0)4 67 39 16 30. ☐ <http://perso.orange.fr/nikolao/esperanto.html>; jf.passarella@free.fr.

18-26: 41-a Internacia Esperanto-Feriado 2007 en Szczawno Zdrój. ☐ Silezia Esperanto-Asocio, str. Dubois 3/1, PL 50-208 Wrocław, Pollando. ☎ +48-71-3296954. ☐ vrocavo@poczta.onet.pl aŭ pomer@wp.pl.

19: Internacia Esperanta Tablotenis-Konkurso, XIX. IETKO en Hódmezővásárhely, Hungario. ☐ Katalintól kapható: Katarina Faragó, ☎ +36-30-356-4202. ☐ farago.kata@espmad.hu.



20-27: FESTO 2007 en Montoire-sur-le-Loir, Francio, temo: *E-Muziko*. ☐ <http://esperanto-jeunes.org/festo2007/>, louise@esperanto-jeunes.org.

21-28: Staĝo en Kvinpetalo, Francio. Preparado al traduko kun Suzanne Bourout kaj Serge Sire. ☐ Kvinpetalo (v. 10 jul).

31 aŭg - 02 sep: 59-a Kongreso de Bulgara Esperanto-Asocio en Kazanlak. ☐ Bulgara Esperanto-Asocio, p.k. 66, BG-1000 Sofia, Bulgario. ☎ +349-(0)2-822-33-47.

31 aŭg - 07 sep: 74-a Itala Kongreso de Esperanto en Pisa (Italio). Kongrestemo: *Eŭropo: multaj lingvoj por komuna lando*. ☐ Gruppo Esperantista Pisano, C.P. 213, IT-56100, Pisa, Italio. ☐ www.esperanto.it/html/fei/congresso.htm.

septembro

01-10: Montara Esperanta Septembro en vilaĝo Zawoja, Pollando. Kunorganizado de Krakova Societo Esperanto kaj Silezia Esperanto-Asocio. ☐ Krakova Societo Esperanto, ul. I. Krasickiego 18-20, PL 31-515 Kraków, Pollando. ☎ +48 606 995113. ☐ pomer@prawo.uni.wroc.pl; konsilo@gmail.com.

02-08: „SUS 30“ – Sesio de Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino en Rimini, Italio, kaj San-Marino. ☐ www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus30/.

07-09: 2-a BRES – Brazila Renkontiĝo de Esperantistoj Spiritistoj en la urbo Uberlândia. Ĉeftemo: *„La libro de spiritoj kaj Esperanto“*; 150 jaroj de disvastigo de Promesita Konsolanto de Jesuo.

☒ ECDEU – Centro de Documentação e Ensino em Uberlândia, Caixa postal: 173, BR 38401-974 - Uberlândia-MG - Brasil. ☎ +55 (34) 3235-0856/9119-3015. ✉ bres@ept.org.br.

08-09: 6-aj Someraj Dialogoj en Monistrol de Montserrat, Barcelono, Hispanio. Prelegoj, dialogoj, E-leciono. ☒ BE-C, Salvador Aragaj, Cami del Pou n-ro 9, ES-08691 Monistrol de Montserrat, Hispanio. ☎ 645404755. ✉ barcelonaesperantocentro@yahoo.es.

12-16: La 16-a konferenco de IKEK (Internacia Komunista Esperanto-Kolektivo) en Dobřichovice apud Prago, Ĉeĥio. ✉ dieter.rooke@tiscali.ch.



13-16: Berlina Arbara Renkontiĝo, BARO en Bad Münder inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ☒ Andi Münchow, Oberstraße 15, DE-30167 Hannover, Germanio. ✉ www.krokodilo.de/baro/baro.php, DL8oap@gmx.net.

16: 10-a Esperanta Renkontiĝo de Taguatinga. Temo: *Esperanto en la ĉefurbo de Brazilo*. ☒ Taguatinga Esperanto-Klubo. ✉ tek.esperanto@ig.com.br.

21-23: NordOkcidenta Regiona Esperanto-Konferenco de Ameriko (NOREK) en la urbeto Sidney apud Viktorio, la ĉefurbo de la Kanada provinco Brita Kolumbio. La temo: *2007 – La Polusaj Regionoj*. ☒ Wally du Temple, 765 Braemar Avenue, NorthSaanich B.C., Kanado, V8L 5G5. ✉ esperanto@shaw.ca.



21-23: XXIII. Artaj Konfrontoj en Esperanto „ARKONES“. Granda manifestacio de Esperanto-kulturo en Poznań, Pollando. Paralele kun ĝi okazas studsesio de interlingvistiko en Esperanto ĉe la Universitato de Adam Mickiewicz. ☎ +48-509-400-317. ✉ www.arkones.org/; arkones@esencko.org.

21-30: Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Svitavy, Ĉeĥio. ✉ podhradska@volny.cz.



24-30: InPaSem 2007 (Internacia Paroliga Semajno), kurso por komencintoj kaj seminario por jamaj parolantoj en Dobřichovice apud Prago, Ĉeĥio. ☒ KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice, Ĉeĥio. ☎ +420257712201, ✉ +420257712126. ✉ <http://www.kava-pech.cz/trip-paroligo2007e-esperanto.html>; chrldle@kava-pech.cz.

27-30: 18-a MontKabana Renkontiĝo (MKR), aranĝo por E-naturemuloj kaj montmigrantoj en laurbeto Beli sur la nordadriatika insulo Cres, Kroatio. ✉ www.keja.hr/mkr-n.html; vanja.radovanovic@ericsson.com.

27 sep-06 okt: Velura sezono, Jalta, Ukrainio. ☎ (0654) 231651, ✉ +38 096 4838585. ✉ www.jaltaespero.narod.ru/esper/festivalo.html; <http://vs.t50.ru/aligxilo.php>; tero@yalta.us; jefim_z@mail.ru; espero@yalta.crimea.ua.

28 sep-03 okt: TORPEDO-3, Tutlandaj Pedagogiaj Tagoj en Herzberg, Germanio. Fakprelegoj, fakseminarioj, spertintersaĝo pri instruado de Esperanto, laborkunsidoj (AGEI, landa sekcio de ILEI). Ĉeftemo: *Utiligo de modernaj metodoj, novaj instruhelpiloj kaj aparatoj por pli efika instruado*. Invitita kursgvidanto: Atilio Orellana Rojas: Cseh-metodo. Ekzamenoj de ILEI/GEI. ☒ ICH (v. 02 jul).

29-30: Aŭtuna Kunloĝado en Jacugatake Esperanto-Domo, Japanio. ☒ Kantoo-Esperanto-Ligo, Hori Yasuo. ✉ horizonto@water.sannet.ne.jp.

29 sep-06 okt: 15-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, sub la aŭspicio de Hispana Esperanto-Muzeo, en la apudmara kataluna vilaĝo Tossa del Mar (Girona), Hispanio. Kursoj, ekskursoj, prelegoj. ☒ Luis Serrano Pérez, Apartat 423. ES-08200 Sabadell (Barcelona), Hispanio. ☎ (34) 93 727 50 21. ✉ <http://personales.ya.com/semajno>; luis_serrano@mixmail.com.

oktobra



05-07: Semajnfinaj intensaj kursoj laŭ 3 gradoj en Herzberg, Germanio. ☒ ICH (v. 02 jul).

05-07: 7-a KoKoLoRES, Semajnfina renkontiĝo por ludemuloj en Herne, Germanio. Samtempe okazos kurso por komencantoj. ✉ www.krokodilo.de/kokolores/kokolores.php; kokolores@esperantoland.de.

05-07: Aŭtuna seminario de Sveda Esperanto-Instituto en Lesjöfors. ☒ Esperanto-Gården, Stifelsevägen 1, SE-680 96 Lesjöfors, Svedio. ☎ + 46-(0)59030909. ✉ <http://e-g.se/p92.htm>, egarden@esperanto.se.

05-08: 14-a Aŭtuna renkontiĝo de Esperanto, ARE en Silver bay, Lake George NY, Usono. ☒ 14-a ARE-ESK, 6358 rue de Bordeaux, Montréal QC, Kanado H2G 2R8. ✉ www.esperanto.qc.ca/; informo@esperanto.qc.ca.

08-12: Kursoj kaj ekskursoj. Fakultativa daŭrigo post la semajnfina kurso kun ekskursoj en kaj ĉirkaŭ Herzberg, la Esperanto-urbo en Germanio. ☒ ICH (v. 02 jul).

11-14: Eksperimenta seminario ĉe la lago Balatono (en Alsóörs, Hungario): Socipsika eksperimento, grupdinamike analizi kaj trejni la internacian sintenon. ✉ Eumacko@aol.com.

13: EMAS-Kulturtago 2007 (Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio) en la hotelo StadtHotel Oldenburg, Hauptstr. 36-40, 26122 Oldenburg, Germanujo. ☒ Thomas Heberlein, Schifferweg 2, DE-31787 Hameln, Germanujo. ☎/✉ + 49-(0)5151823904. ✉ emas@esperanto.de.

19-20: Kolokvo pri planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj. ☒ Esperanto-muzeo, Herbert Mayer, Palais Mollard, Herrengasse 9, AT-1010 Wien, Aŭstrio. ☎ +43-1-53410/731 (730). ✉ herbert.mayer@onb.ac.at.

19-21: Course-You-Can. Esperanto-kurso por komencantoj en Barlaston, Britio. ☒ Esperanto-Domo (v. 18 aŭg).

19-21: 62-a Regiona Staĝo de Esperanto en Sâles, Alzaco. ✉ <http://esperantostrasbourg.free.fr/>.

19-21: 2-a Internacia Festivalo de Esperanto en Zaozhuang, Ĉinio. ☒ Zaozhuang-a Esperanto-Asocio, Wenhua Xilu 23 Hao 105 shi (Tu Shu Guan), shijieyu xiehui. ☎ +86-632-3317532. ✉ verdalumo@126.com aŭ semio@163.com.

21-28: 2-a Kijiva Esperanto-Semajno. ✉ p/k 35, UA-01133 Kijiv-133, Ukrainio. ☎ +380-044-2851701; +380-80974403172. ✉ volodimir_h@yahoo.com.

26-28: TILE-3, Tagoj de Internacia Lingvo Esperanto en Soĉi (Kaŭkaza bordo de Nigra Maro), Rusio. ☒ Esperanto-klubo LARO, abonkesto 913, RU-354000 Soĉi, Rusio. ☎ +7-8622/621347, aŭ +7-918-1015590. ✉ laro@sochi.ru.

30okt-03nov: Staĝo en Kvinpetalo, Francio. Inicado kaj unua praktiko de Esperanto kaj praktikado de la lingvo kun Suzanne Bourrot kaj Serge Sire. ☒ Kvinpetalo (v. 10 jul).

novembra

01-04: Karstaj tagoj en Triesto. Invito al esplorado de la mistera subtera mondo, kaj al speleologia ekskurso. ☒ Triesta E-Asocio, C.P. 601, IT-34100 Trieste Centro, Italio. ☎ +39-040763218. ✉ Edvige.Ackermann@tele2.it aŭ testudo@adriac.com.it.

24: Malferma Tago, CO de UEA. ☒ En la kolofono.

30 nov - 02 dec: Semajnfinaj intensaj kursoj laŭ tri gradoj en Herzberg, la Esperanto-urbo en Germanio. ☒ ICH (v. 02 jul).

decembra

03-07: Kursoj kaj ekskursoj (fakultativa daŭrigo post la semajnfina kurso kun ekskursoj en kaj ĉirkaŭ Herzberg, la Esperanto-urbo en Germanio). ☒ ICH (v. 02 jul).

14-16: 35-a Studsesio en Herzberg, Germanio. Prelegos D-ro sc. Detlev Blanke: Enkonduko al Interlingvistiko I. ☒ ICH (v. 02 jul).

15: Zamenhof-festo kun muziko en Herzberg, Germanio. Monda Esperanto-Tago: Tago de malfermita pordo en la Esperanto-biblioteko kaj arkivo de ICH. ☒ ICH (v. 02 jul).

27 dec-03 jan: 24-a IF - Internacia Festivalo en germana Bendorf, 10 km norde de Koblenz. Kadra temo: *Vojaĝoj al konataj kaj malpli konataj celoj*. La ejo disponas pri naĝejo kaj saŭno. Tuttaga ekskurso al Rejnvalo/Lorelej. Plilongiga ebleco ĝis la 5-a de januaro. ☒ Hans-Dieter Platz (HDP), Postfach 1148, 34303 Niedenstein, Germanio. ☎/✉ +49-5624-8007, ✉ +49-171-4964558. ✉ <http://www.internacia-festivalo.de/>; HDP@internacia-festivalo.de.

27 dec-03 jan: 6-a NR - Novjara Renkontiĝo en Föckinghausen apud Meschede, Germanio. ☒ EsperantoLand (v. 13 jul).

27 dec-03 jan: 51-a Internacia Seminario (IS) en Würzburg, Germanio. Serioza programo, senstreĉa etoso kaj diboĉa festado. ✉ <http://ttt.esperanto.de/is, www.esperanto.de/is/ao/2007/aligxilo>.

januaro

03-06: **PostNR – PostNovjara Renkontiĝo** en Föckinghausen apud Meschede, Germanio. ☒ EsperantoLand (v. 13 jul).

14-23: **Oceania Kongreso de Esperanto** en Auklando, Nov-Zelando, kunlabore de AEA (Aŭstralio) kaj NZEA (Nov-Zelando) en konferencejo St Francis Retreat Centre, en Hillsborough, Auckland NZ. ☒ P.O. Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035, Nov-Zelando. ☐ www.esperanto.org.nz/, nzea@esperanto.org.nz.

februaro

11-15: **5-a Azia Kongreso de Esperanto** en Bengaluro, Barato. La temo: *Esperanto en multlingva Azio*. ☒ 5-a Azia Kongreso, 44, II Cross, Anugraha Layout, Bilekahalli, off B.G. Road, Bengaluru 560 076, Karnataka, Barato/India. ☎ +91-94409 43542. ☐ www.geocities.com/bharato_ranganayakulu@gmail.com.

marto

01-08: **Mediterranea Esperanto-Semajno**. Antaŭtagmeze E-kursoj kun Josée Lafosse, Monique Arnaud kaj Claude Piron. posttagmeze promenado, piedirado, familia vivo, vespere distraĵoj, en komforta hotelo. ☒ Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, FR-83700 Saint-Raphael, Francio, aŭ Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du progrès FR -83600 Fréjus. ☎ 0033(0)494956618, 0033 (0)4 94 83 06 88. ☐ prezmoni@hotmail.com.


majo

01-11: **20-a Esperanto-festivalo „Aroma Jalto“**, Ukrainio. ☒ p/k35, Kiev-133, UA-01133, Ukrainio. ☎ +380-44-2851701, +380674403172. ☐ volodomir@ukr.net

15-18: **Berlina Arbara Renkontiĝo**, Printempa BARo 2008 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ☒ Andi Münchow (v. 13 sep).

julio

11-14: **56-a ELNA-Kongreso**, Montrealo, Kanado. ☒ Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530, Usono. ☐ <http://www.esperanto-usa.org/>; elna@esperanto-usa.org.



12-18: **7-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto** en Kanado. ☒ TAKE-ESK, 6358-a, rue de Bordeaux, Montréal QC, Kanado H2G

2R8. ☐ <http://www.take7.ca/>; informo@take7.ca.

19-26: **93-a Universala Kongreso de Esperanto**, Roterdamo, Nederlando (v. la kolofono).

27 jul-03 aŭg: **KEF** (Kultura Esperanto-Festivalo) en la ĉarmega urbo de Hamlet (almenaŭ de lia kastelo): Helsinger. ☐ <http://kef.saluton.dk/>; kef9@tejo.org.

septembro

04 -07: **Berlina Arbara Renkontiĝo**, Aŭtuna BARo 2008 en Bad Münden inter Hannover kaj Hameln, Germanio. En la arbaro, tial ideala por familioj kun etaj infanoj. ☒ Andi Münchow (v. 13 sep).

oktobro

02-05: **8-a KoKoLoRES** – Semajnfina renkontiĝo por ludemuloj en Herne, Germanio. Samtempe okazos kurso por komencantoj. ☐ kokolores@esperantoland.de.

novembro

07-09: **KAEST 2008** (Konferenco Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) en la pensiono Sokol en Dobřichovice, Ĉeĥio. ☒ KAVA-PECH (v. 20 jul).

Mapo de E-aranĝoj troviĝas ĉe:

www.Esperantoland.org.

Aktuala listo de konataj E-aranĝoj

daŭre konsulteblas ĉe:

www.eventoj.hu/kalendar.

La 60-a Internacia Kongresa Universitato: La nova IKU-libro pretas

La prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato en Jokohamo jam haveblas en la nova, ĵus kompletigita IKU-libro

En la libro (redaktis A.Wandel) vi trovos 9 prelegojn, 120 paĝojn, multajn diagramojn kaj bildojn.

La libro mendeblas jam nun ĉe UEA, kaj kiel ĉiam, en la Libroservo dum la UK.

La Internacia Kongresa Universitato (IKU) ĉi-jare festas sian sesdekan datrevenon. La IKU aldonas al la UK altnivelan klerigan kadron de prelegoj en variaj temoj. La ĉi-jara elekto de prelegoj estas granda kaj varia. Estas prelegoj pri astronomio, medicino, geografio kaj filozofio. Aliaj rilatas al la kongrestemo *Okcidento en Oriento: akcepto kaj rezisto*.

Ankaŭ ĉi-jare okazos tri AIS-kursoj, kiuj konsistas el po tri prelegoj: la unua enkonduka IKU-prelego kaj du daŭrigaj prelegoj, en kiuj la preleganto povos pli

profunde kaj vaste prezenti la temon.

Ĉi-jare estas senprecedenca plimulto da prelegantoj el orienta Azio: kvar japanaj, unu korea kaj unu ĉina.

Komence de la ĉi-jara IKU-libro vi trovos artikolon pri IKU kaj Esperanto en la scienco kaj tekniko. La artikolo kaj la resumoj de la prelegoj havas tradukojn en la franca, la angla kaj (nur la resumoj) en la japana, por ekstera informado pri la scienca kaj eduka laboro en Esperanto.

La IKU-libro povas esti utiligata por demonstri la sciencon, fakan kaj edukadan aplikadon de Esperanto al eksteraj instancoj, kiel Unesko kaj scienc-rilataj kaj universitat-rilataj organizaĵoj.

Amri Wandel



Spezokonto


de Universala Esperanto-Asocio por la jaro 2006

Rezulto 2005	KOSTOJ	Buĝeto 2006	Rezulto 2006	Rezulto 2005	RIMEDOJ	Buĝeto 2006	Rezulto 2006
212020	Salajroj	219000	209006	2743	Membroj Gvidlibro	2900	2746
42744	Socia asekuro	34300	33069	23609	Membroj Jarlibro	21000	24005
4095	Suplementoj	4800	4482	1232	Dumvivaj Membroj kun Jarlibro	1100	1452
281	Kafo, teo, lakto	400	245	117608	Membroj-Abonantoj	119000	120435
0	Malsankompenso	0	-18940	50765	Dumvivaj Membroj	50500	51576
11702	Pensiarango	11950	12100	5672	Membroj Jarlibro (junaj)	4250	5659
270842	Salajroj ktp, nete	270450	239963	4184	Membroj-Abonantoj (junaj)	4150	4346
10571	Afranko, nete	11300	9753	205814	Kotizoj de individuaj membroj	202900	210219
1909	Telekomunikiloj	2750	1661	8882	Aligitaj membroj	8900	8788
1842	Presajoj	1950	2038	1530	Aligitaj membroj junaj	1350	1414
3066	Materialoj	3500	3339	4007	Abonoj <i>Esperanto</i>	3900	3639
1591	Maŝinoj, riparo/prizorgo	1200	1873	564	Kolektivaj abonoj <i>Esperanto</i>	550	582
850	Revizorado	850	958	5103	Abonoj <i>Kontakto</i>	4900	5359
1714	Administraj pagoj	1600	2635	771	Kolektivaj abonoj <i>Kontakto</i>	850	366
2477	Kopiado	1750	2606	15220	Societo Zamenhof	13500	13513
-850	Kopiado (vendoj)	-950	-1935	2915	Fakaj Organizoj	3200	2912
23169	Centra Oficejo, nete	23950	22929	-2601	pago al TEJO	-2150	-2556
7275	Gaso, elektro	7400	7119	242205	Kotizoj	237900	244236
674	Akvo	700	481	128021	Vendoj de la Libroservo	125000	133809
3646	Riparo de la Domo	3300	3295	-86401	Kosto de la varoj venditaj	-83750	-92432
930	Purigo	1000	1251	41620	Libroservo, malnete	41250	41377
3331	Asekuroj	3500	3554	-2395	Merkatado	-1250	-2537
2223	Impostoj je la Domo	1750	2219	0	Katalogokostoj	-1800	0
-1320	Luo ricevita	-1050	-1183	-1858	al stokrezervo	-1600	-1847
16759	Oficeja Domo, nete	16600	16737	1961	Abonfako	1500	2621
20580	Preskostoj <i>Esperanto</i>	22000	17948	39328	Libroservo, nete	38100	39614
12460	Grafiko	13000	12770	20424	Vendoj de Eldona Fako	19500	19703
32426	Dissendo/kovertoj	30500	35888	-25437	Aldonoj (novaj libroj)	-9300	-11092
-653	Anoncoj	-1500	-600	12674	Ŝanĝo stokvaloro	-3500	-1403
64812	<i>Esperanto</i>, nete	64000	66005	-1301	al stokrezervo	-1200	-1220
6633	Preskostoj <i>Jarlibro</i>	6400	6797	-1887	Tantiemoj kaj stokado	-1850	-2012
9762	Dissendo/kovertoj	8250	9690	4473	Eldona Fako, nete	3650	3976
1920	Grafiko	2000	2000	6970	Grafikaj servoj CO	7500	3994
-3761	Anoncoj	-3500	-3542	7760	Aliaj servoj CO	6000	4349
14554	<i>Jarlibro</i>, nete	13150	14944	0	Programado	1000	1000
4720	Preskostoj <i>Kontakto</i>	4850	4437	700	Institucio Hodler	700	700
3919	Dissendo/kovertoj	3600	4035	1000	Kompenso Propaganda Konto	7500	0
1710	Grafiko	2400	1500	0	20%-a ĝustigo: laŭ kalkulo	500	0
2700	Redakto	2800	2820	8000	20%-a ĝustigo: al rezervo	5000	-30000
0	Anoncoj	-100	0	24430	Servoj kaj Kompensoj	28200	-19957
13049	<i>Kontakto</i>, nete	13550	12792	74280	Kotizprocentaĵo UK	75600	86344
8031	Estraro (vojaĝado)	12000	9575	-9200	Rezervo	1000	-21500
1291	Estraro (korespondado)	2000	1296	478	Turismo	1000	98
3022	Oficistoj (vojaĝado)	3000	2793	49593	Rento, nete	46000	55445
2278	Vojaĝado (UK)	2500	2398	2312	Donacoj	2950	1132
14622	Vojaĝoj/korespondado	19500	16063	2591	Aliaj	4800	30232
2244	Edukado	4000	3147	120054	Diversaj enspezoj entute	131350	151750
4155	Informado	4500	4868	430490	Sumo de la rimedoj	439200	419619
1622	Eksteraj rilatoj	2500	2423	14972	Saldo	8650	269
0	Komisiitoj, vojaĝoj/korespondado	500	435	445461	Sumo de la kostoj	447850	419888
8021	Movada evoluigo	11500	10873				
1579	Bankokostoj	1850	1269				
784	Kurzdiferencoj	0	-260				
2137	Reprezentado	2300	2605				
5391	Antaŭaj jaroj	1000	7384				
0	Diversaj kostoj	100	0				
9890	Ĝeneralaj kostoj	5250	10998				
0	Amortizo, domo	0	0				
850	Amortizo, aparatoj/mebloj	850	768				
2899	Amortizo, komputiloj	2400	2308				
1507	Amortizo, programaro	1650	1392				
5256	Amortizo entute	4900	4469				
3603	AO – oficistaro	3500	1677				
1324	AO – ilaro, materialo	1500	2440				
-440	AO – enspezoj	0	0				
4487	Afrika Oficejo entute	5000	4117				
445461	Sumo de la kostoj	447850	419888				

Pro teknikaj kaŭzoj la bilanco de la 31-a de decembro 2006 ne povas aperi ĉi-numere. Interesitoj bv. peti ĝin de la Centra Oficejo.

Rusa kvarteto

Jazyk Esperanto za odin mesjac. Samoučitel' razgovornogo jazyka. I.G. Gončarova. Moskva: AST, 2006. 156p. 17cm. ISBN 5170385463. € 7,50.
Elementarnaja grammatika jazyka esperanto. N.L. Gudskov. Moskva: AST, 2006. 91p. 17cm. ISBN 5170385439. € 4,50. *500 samyh vajnyh slov jazyka esperanto.* N.L. Gudskov. Moskva: AST, 2006. 31p. 17cm. ISBN 5170385447. € 3,00. *Strana Esperantija — Karmanaja enciklopedija.* N.L. Gudskov. Moskva: AST, 2006. 159p. 17cm. ISBN 5170385455. € 7,50.



Kvar similaspektaj poŝlibretoj – tutevidente ligitaj unu al la aliaj – verkitaj por memlernantoj de la internacia lingvo formas serion de lerniloj pri Esperanto. La eldonaĵoj viciĝas inter centoj da prilingvaj publikaĵoj de la rusa eldonejo БОТОК – ЗАПАД (Oriento-Okcidento).

Lernanto aĉetinta la libretojn estos bone ekipita kaj havos ĉion necesan – krom eblo rekte komuniki kaj en la praktiko uzi la lernatan lingvon – por memstare alproprigi la bazon de Esperanto, eĉ se ne ene de unu monato, kiel tion I. Gončarova promesas en sia lernolibro. En ĝi ŝi en senpera stilo gvidas la legantojn al tiu ĉi celo, alparolante ilin, interplektante la du lingvojn, klarigante la gramatikajn regulojn, invitante al ekzercoj.

Komence de la lecionoj la enkonduko prezentas la ĉefajn temojn de la koncerna unuo. Tiun parton sekvas la tekstoj, plej ofte traktantaj movadajn temojn, ekz.: Ŝakista familio, En la klubo, Rajt kaj Lerta decidas lerni Esperanton, Preparo de Esperanta aranĝo, En la IJK [tiel!] ktp, kiuj finiĝas per dudirekta vortolisto. Tiun parton sekvas de 4 ĝis 10 paragrafoj, kie estas pritraktataj la novaj eroj (gramatiko, leksiko, tekstoj, pliaj legaĵoj, literaturaĵoj). La instruo de la novaj eroj okazas laŭ la gramatika-traduka metodo, do ĉio estas tradukita. La lecionojn fermas ŝlosiloj, kiuj helpas en la kontrolo de la faritaj taskoj.

Fine de la libro troveblas leksika indekso, kie ĉe la vortoj (Esperanto-rusaj) ciferoj indikas la lecionon, kie ili aperas. Bedaŭrinde ne estas simila helpilo por trovi la gramatikajn erojn, kaj fakte mankas eĉ normala enhavtabelo, kie oni povus legi, en kiu leciono pri kio temas. Tiel la lernanto devas simple laŭvice progresi en la libro, trastudi la 12 lecionojn, kiuj donas abundan materialon pri la lingvo kaj kulturo, kaj konsilojn por plia studado kaj ekzercado.

Por havi sisteman gramatikan trarigardon jen la dua libreto, verkita de N. Gudskov. En ĝi la aŭtoro prezentas en la rusa

lingvo la gramatikon, donas ekzemplojn kaj listojn pri la apliko de la plej gravaj menciitaj elementoj.

La profundeco de tiuj klarigoj ne transiras la limojn de bazaj scioj, tamen tuŝas ĉiujn necesajn punktojn, kiujn lingvouzanto – sen grandaj kaj lingvistikaj pretendoj – povas bezoni.

Legeblas ankaŭ kelkaj primovadaj informoj, praktikaj konsiloj (ekz. pri la komputilaj skribmanieroj kun iksoj!) kaj la aŭtoro atentigas pri falsaj amikoj ĝenantaj inter la du lingvoj. Post la ĝenerala prezento en la unua aldona parto legeblas la 16 reguloj kaj en la dua venas listo de plurcentoj da internaciaj vortoj, ĉefe teknikaj terminoj, kompreneblaj (por rusoj) sen traduko.

Kvankam kun alia vortostoko ol uzita en la lernolibro, la tria kajereto kun la 500 plej gravaj vortoj de Esperanto povas servi kiel poŝvortaro. La leksiko estas prezentita en laŭtemaj tabeloj, en kies unuaj du kolumnoj legeblas la rusaj vortoj kaj ties Esperanta traduko. En la tria kolumno troviĝas la transskribita prononco de la E-vortoj. La 46 temoj rilatas plejparte al nocioj, ĉiutagaj esprimoj, sed fine de la libreto aperas ankaŭ gramatikaj listoj de koloroj, numeraloj, adjektivoj, verboj, pronomoj ktp.

La orientiĝon ene de la temoj, serĉadon de konkreta vorto bedaŭrinde helpas nek enhavtabelo, nek iu logika vicordo. Same mankas almenaŭ alfabeto aranĝo en ajna lingvo. Ne rimarkeblas „ordo” ankaŭ ene de la temoj; la tieaj ĉ. 10-15 vortoj viciĝas ŝajne sen interna logiko.

Dum la unuaj tri libretoj servas por la lernado de la lingvo, la kvara eldonaĵo klerigas pri la Esperantaj kulturo kaj movado. En la libro la leganto povas legi interesajn faktojn, ne nur historiajn, sed ankaŭ koncerne la aktualan situacion, organizadon, instruadon de la lingvo, ties politikan kaj lingvopolitikan pozicion kaj ekkoni la lingvouzan medion. (Malaktualaj estas jam la informoj pri la E-radioelsendoj kaj mankohavaj tiuj pri la reto.)

Signifan parton okupas la „panteono” kun prezento de 25 tre gravaj – tamen preskaŭ kvindekprocente rusaj – figuroj de la historio kaj kulturo de Esperanto.

La libron finas listo de konsilataj legaĵoj kaj utilaj adresoj (ambaŭ listoj estas faritaj ĉefe por rusoj).

Estas laŭdirinde, ke la kvar, unu la aliajn kompletigantaj lernomaterialoj, aperis en po 2000 ekzempleroj kaj aĉeteblas ĉe prestiĝa rusa eldonejo.

Tiumaniere Esperanto havas pli da ŝanco por esti malkovrata ankaŭ de ekstermovaduloj.


Katalin Kováts

Aprobinda, sed kun detenoj

Esperanto elektronike. Komputila DVD.
Partizánske: Espero, 2006. Prezo: € 9,00

Prestidigitistoj estas la kompilintoj de la DVD *Esperanto elektronike*. Alivorte magiistoj, kiuj el ordinara DVD-skatolo kapablas elŝiri ne ludkartojn, kravatojn aŭ kuniklojn sed filmeton kaj fotojn, librojn kaj ludojn, informojn kaj instruilojn. Verdire, enestas tiom da eroj, ke oni finfine seniluziiĝas, ke ne elskatoliĝas la estraro de UEA, kune kun Nieuwe Binnenweg 176 kaj preterklakanta tramo. Sed ankaŭ novaj teĥnologioj konas siajn limojn.

Kaj jes, ankaŭ la DVD konas siajn limojn. Ekzemple la filmeto pli bruas ol instruas, kaj la fotoj – pri kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj – skrapas nur la surfacon de la Esperanta komunumo. Ĝenas eksmodaj aludoj: *Universalaj kongresoj okazos en Fortaleza, Brazilo (2002) ...*: kial, en DVD publikigita en 2006, bazaj informoj tiaj ne estas ĝisdatigitaj? Cetere eblas legi pri Spomenka >>timec (tiel) kaj Alan Ayckbourg: ĉi-lastata eble kuzo de la angla dramisto Alan Ayckbourn.



Tamen pli vastas kaj pli valoras la sekcioj pri libroj, vortaroj kaj fakaj tekstoj (malgraŭ tio, ke ĉe la recenzata DVD ne malfermiĝis artikoloj de i.a. Detlev Blanke kaj Umberto Eco). Efektive, indas akiri la DVD-on simple por posedi la 696 paĝojn de la *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (Bertilo Wennergren). Aldone haveblas la *Hejma Vortaro* (Jouko Lindstedt), la *Komputada Leksikono* (Sergio Pokrovskij) kaj la *Matematika Vortaro* (Jan Werner).

Tiuj, kiuj ne volas vortar- aŭ leksikumi, povas profundigi en verkojn de Carroll, Dickens, Gogol, Poe, Puŝkin kaj multaj aliaj (bedaŭrinde neglektatas tamen originala Esperanto-literaturo). Legeblas numeroj de la revuo *Esperanto* aŭ *Kontakto* kaj aŭdeblas kanzonoj de dudeko de la plej gravaj verdaj muzikistoj.

La DVD memorigas esperantistojn – se necesas memorigado – pri la nuna socia kaj kultura riĉeco de la zamenhofa koncepto. Samtempe, pro la multlingveco de la DVD, eblas ĝin ekspluati por montri al nacilingvaj cinikuloj aŭ skeptikuloj,

ke Esperanto estas multe pli ol nura lingvo.

Do, ĝenerale, la DVD aprobindas. Espereble sekvos ĝisdatigita versio – pli zorge redaktita por elsarki la eraretojn kaj por garantii, ke ĉiu ero egale kontribuu al la magio de la elskatoligita DVD.

Paul Gubbins

Oni ne sentas ĝin tradukaĵo

La lupino kaj aliaj rakontoj de Saki. H.H. Munro. Tradukis el la angla Edmond Grimley Evans. Kembriĝo, 2005. 152p. 20cm. ISBN: 0902756249. Prezo: € 12,90

H. H. Munro, kies plumnomo estis Saki, estis skota novelisto, kiu vivis 1870-1916. Li verkis aron da satiraj noveloj kaj unu romanon. Karakterizas liajn novelojn inventema sprito, kaj imago kiu preskaŭ kredigas ke ili povus prezenti realajn eventojn.

Ekzemplo estas la novelo *La kluba mensogulo*. Temas pri mensogulo, kiu volis sin savi de tre teda konversaciulo, kiu sidis apud li en londona klubo. Kiam ajn la fanfaronema konversaciulo komencis paroli, la mensogulo tuj interrompis lin per elpensita kaj tute nekredebla rakonto pri iu aventuro de konato aŭ parenco, rakonto tiom grandioze nekredebla ke la tedulo neniel povus superatuti ĝin per rakonto propra. Fine la tedulo stariĝas kaj foriras, kaj la mensogulo povas trankvile legi.

Per nemultaj vortoj, Saki sukcesas krei etoson en kiun la leganto facile lokas sin. Alia rakonto, *La lupino*, temas pri

viro kiu fanfarone kredigas al grupo ke li povas, post sia vizito al Hindio, estigi preskaŭ miraklajn eventojn. En la grupo, virino defias lin ŝanĝi ŝin en lupinon. Tion li rifuzas, ĉar li ja nur mensogadis pri siaj kapabloj. Sed ĉeestanto sekrete aranĝas ke malsovaĝa lupino kaŝe estu alportita, kaj dum la virino kelkajn minutojn forestas, li aperigas la lupinon. Tio teruras la fanfaronemulon, kiu ekde tiam ne plu volas paroli pri siaj „miraklaj“ kapabloj.

Dudeko da tiaj noveletoj distras la leganton, kiu ĝuas ne nur la nekutiman humuron de la verkinto, kaj la trokredemon de la ĉiutagaj homoj en la socio, sed ankaŭ bonan literaturan kvaliton.

Konforme al sia reputacio, Edmond Grimley Evans senĝene redonas la rakontojn en Esperanta vesto tia, ke oni ne sentas ilin tradukaĵo. Liaj vortelektoj kaj gramatikaĵoj estas senmakulaj. Li mem kompostis la libron, egale tiel lerte kiel li tradukis la tekstojn. Do, plezuraĵo por la legemulo.

Don Broadribb



Fakte kaj fantazie pri la italoj

Ksenofobia gvidlibro al la italoj. Martin Solly. Esperanta traduko de Anna Löwenstein.

Milano: Federazione Esperantista Italiana, 2006. 72p. 18cm. Prezo: € 9,00.

Laŭ noto fine de la libro, la aŭtoro de ĉi tiu ĉarma libreto estas anglo vivanta en Italio. Ke li estas anglo oni povas jen kaj jen rimarki tra la libro: oni ja povas spuri specon de angla aroganteco en kelkaj lokoj. Mi scias, tio sonas iom ĝeneralige – ne ĉiuj angloj/britoj estas samaj. Sed ankaŭ ne ĉiuj italoj estas samaj, krom se oni akceptas la vidpunkton de Solly.

Kvankam jam en la komenco la aŭtoro atentigas la leganton ke „[l]a italoj ne estas raso, sed aro da popoloj“ (p.1), tra la tuta libro li ĝeneraligas per „la italoj“, „ĉiuj italoj“. Ni, do, devas kredi ke, kvankam la italianoj „emas pensi pri si mem ĉefe kiel romanoj, milananoj, sicilianoj aŭ florencanoj, kaj nur duavice kiel italoj“ (p.1), „[l]a italoj mem vidas sin kiel pasiajn kaj ĉarmajn“ (p.9), „[l]a italoj amas eksterlandanojn“ (p.10), „[l]a italoj estas malavara popolo“ (p.19), „[l]a italoj estas ĝentila popolo“ (p.20), „[l]a italoj pretas mortigi kaj manĝi preskaŭ ĉiun estaĵon, kiu kuras, flugas aŭ naĝas“ (p.28), „[l]a italoj estas elstare praktikaj“ (p.29), „[l]a italoj maltrankviliĝas pro objektoj, okazaĵoj, konduto kaj (precipe) homoj, kiuj laŭ ili kaŭzas, aŭ povus kaŭzi, al ili misŝancon“ (p.48), „[l]a italoj estas manĝocentra popolo“ (p.50). Tiu „la“ komence de ĉiu frazo igas la leganton pensi pri ĝeneraligo. Multaj el tiuj ĝeneralaĵoj validas ankaŭ por aliaj landoj. Feliĉe la italoj estas tolerema kaj ĝentila popolo, kaj ne ĝeniĝos pro la ĝeneralaĵoj, kiujn brito skribis pri ili. Oni povas demandi sin kiel reagus brito al la aserto de italo ke „la britoj estas morna kaj senhumura popolo“. Tiaj ĝeneralaĵoj nur aldonas al la listo



de stereotipaĵoj. Kaj tiu pri italoj estas aparte impona.

Oni tamen ne miskomprenu: la libro ne konsistas nur el tiaj [diskutindaj] ĝeneralaĵoj. Ĝi ja provizas la leganton per interesaj rimarkoj pri la „popolo en la boto“. Informoj (diskretaj) pri familio, pri obsedoj, pri kutimoj kaj tradicioj, por menciis nur kelkajn, donas pli realisman bildon pri tiu ĉarma „popolo de popoloj“.

La libreton, en senriproĉa Esperanto (kian oni atendas de *prima donna*), ni ŝuldas al, precipe, la

tradukinto (ŝi mem brito vivanta en Italio) kaj al la 91-a UK okazinta en Italio, por kiu la libro pretiĝis kaj kie ĝi lanĉiĝis. Ĝi estis unu el la furoraĵoj de la kongresa libroservo kaj ne senkiale: malgrandformata, facillingva, plaĉastila, la libreto estas utila gvidlibro por tiuj kiuj volas koni Italion kaj ĝian popolon „tra l' okuloj de aliaj“. Oni povas ekscii el ĝi pri la karaktero, konduto kaj ĝentileco de italoj; po iom el la publika vivo en Italio (distrado, komerco, publikaj servoj), kaj eĉ iom (tro malmulte) pri la historio, kulturo kaj politiko de la lando. Sed, prefere mi ne tro detalu, por doni al la leganto mem la plezuron malkovri la ĉarmon kaj utilon de la libro.

Tiaj libretoj, malgraŭ siaj mankoj, estas tre bonvenaj por nia vojaĝema, scivolema, aperta komunumo. Ni esperu ke la libro de Solly estas la unua en serio de tiaj „ksenofobiaj gvidlibroj“, kies devizo estas „Konu nin, ŝatu nin!“, kaj kiuj ja povas esti kuraciloj kontraŭ la ksenofobia malsano (dorskovrilo). Dankon, do, al la iniciatintoj, kaj plenan ĝuadon al la legantoj. **Ionel Oneț**

Koruso bretona, muziko plurkultura

Meven. Bretona Esperanto-Koruso. KD. Sant-Brieg: Esperanto-Bretagne. 2001. Prezo: € 12,90; Ondumoj tra la mond'. KD. Sant-Brieg: Esperanto-Bretagne. 2004. Prezo: € 19,80

La Bretona Esperanto-Koruso jam kreis du kompakt-diskojn kiuj similas laŭ kvalito kaj malsamas laŭ enhavo. La korusanoj estas laŭvorte amatoroj: ili kantas kune, ĉar ili amas la muzikon kaj la kunkantadon. Tiu amo memevidentiĝas por ajna aŭskultanto: oni povas aŭdi la ridetojn en ĉiu silabo. La voĉoj estis tiuj de najbaroj anstataŭ tiuj de profesiuloj. Tio fakte aldonas tre agrablan spiriton al la muziko, ĉar tiel la aŭskultanto kredas ke „ankaŭ mi povas tiel kanti“. La amatoreco de la koruso invitas al kunkantado kvazaŭ oni sidas en salono kun amikoj. La muzikiloj kiuj akompanas la kantistojn, estas simplaj kaj simple ludataj. Ankaŭ tio donas tre plaĉan impreson, ke oni umas kun amikoj anstataŭ aŭskulti koncerton formalan.

La enhavo de la unua disko *Meven* konsistas plejparte el francaj kantoj, precipe de Bretonio. Kelkaj ja havas tre fortan

guston de bretona stilo. La libreto donas originalan version de preskaŭ ĉiuj tekstoj, inter kiuj troviĝas unu en la bretona. Strange, unu teksto tute mankas: tiu de la kanono *Ek! Venu!*, kiu estas traduko de angla kanono.

La enhavo de la dua disko *Ondumoj tra la mond'* montras pli forajn fontojn, kvazaŭ la mevo pli longe forflugis por kolekti kantojn. Tie ĉi oni aŭdas kantojn de Francio, Zairio, Nederlando, Hispanio, Rusio, Pollando, Flandrio, Kubo kaj Kanado. Ne nur la fontoj estas internaciaj, ankaŭ la stilo de la kantado kaj la instrumentoj akompanaj. La efiko de tiu ĉi kantaro tute malas rilate la unuan diskon, ĉar la unua montras bretonan kulturon dum la dua montras diverse internacian kulturon. Du kantoj sur la dua disko prezentiĝas dufoje: unue kun la teksto kaj poste sen teksto. Do la invito estas tre rekta: „Jen via vico. Ekkantu!“ Fakte tio estas la ĝenerala impresado de tiuj ĉi kantaroj: ili invitas al kunkantado kaj bone montras ke iu ajn grupeto de lokaj esperantistoj povas kuniĝi kaj kunkanti tiujn kantojn kun foraj amikoj de Bretonio.

Miko Sloper

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

100 gravaj personoj de la slovakia Esperanto-movado. 100 významných osobností slovenského esperantského hnutí. Ján Vajs. Partizánske: Espero, 2007. 47p. 21cm. ISBN 9788096953356. Ilus; du-lingva (E, slovakia). € 2,40

100 zamenhofaj proverboj. Serio 2. Nora Caragea. Frankfurt am Main: La aŭtoro, 2007. 50p. 15x21cm. 100 pliaj proverboj deĉifrendaj el „nekonata skribo“. € 10,80

Afero de espero. Konkiza historio de la Esperanto-movado en Afriko. Heidi Goes. Rotterdam: UEA, 2007. 86p. 21cm. ISBN 978929170969. Ilus. La unua provo de historio de la E-movado sur la nigra kontinento; kovras la periodon de la komenco ĝis la jaroj 1990. € 9,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Aktoj de la Akademio I: 1963-1967. Rotterdam: AdE, 2007 (2-a eld). 64p. 21cm. ISBN 9789081187015. Historio de la lingvaj institucioj, Statuto de la Akademio de Esperanto, Enketo kaj decidoj pri la pasivaj participoj k.a. € 3,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

Bedaŭrinda verko. Ignat Florian Bociort. Berlin: La aŭtoro, 2007. 20p. 21cm. Repliko al *Cxu Esperanto postvivos la jaron 2045* de dro Tazio Carlevaro. € 1,50

Bretonaj fabeloj. Jean-Pierre Ducloyer. Rennes: FEB, 1007. 75p. 21cm. ISBN 2952097836. Kvankam originale verkita en Esperanto, la 7 fabeloj „el Brocejlando“ estas profunde inspiritaj de la bretona folkloro. € 6,00

Ĉio fareblas. Aline de Pétigny. El la franca trad. M. kaj Ch. Rivière. Cholet: Éditions Pour penser à

l'endroit, 2006. 16p. 20cm. ISBN 9782915125238. Kolorilus. „Historio por pensi ĝustasence“. € 6,00

Deŭzio. Japanaj kantoj en Esperanto, vol. 5. Kolektis Konisi Gaku. Trad. el la japana. Aiti-ken: Beltono, 2006. 64p. 26cm. ISBN 488887042X. Tekstoj kaj muziknotoj por 50 kantoj. € 5,70

Eklipsas. Poemaro. Jorge Camacho. Rotterdam: Bero, 2007. 115p. 20cm. La plej freŝa poemaro de engaĝita poeto; grandparte inspirita de kaj verkita en Azio. € 9,90

Enotero. Japanaj kantoj en Esperanto, vol. 2. Kolektis Konisi Gaku. Trad. el la japana. Aiti-ken: Beltono, 2006. 29p. 26cm. ISBN 488887039X. Tekstoj kaj muziknotoj por preskaŭ 50 kantoj. € 5,70



Esperanto con il metodo diretto, L'. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la italan trad. L. Oberrauch. Martin: La aŭtoro,



2007. 114p. 25cm. ISBN 9788096966714. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por itallingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50

Esperanto prjamym metodom. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la rusan trad. Br. Ĉupin. Martin: La aŭtoro, 2007. 114p. 25cm. ISBN 9788096966721. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por ruslingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. 7,50

Fumado, La. Robert Molimard. En Esperanton trad. la aŭtoro. Fontenay-sous-Bois: SIDES, 2007. 230p. 21cm. ISBN



9782868611406. Ŝlosiloj por fumantoj kiuj volas [provi] liberiĝi de tabakfumado. € 22,20

Fundamento de Esperanto. Eldono

Hungara. L.L. Zamenhof. En la hungaran trad. J. Horvath. Antwerpen: FEL, 2006. 142p. 21cm. ISBN 9077066249. Nova traduko! € 14,40

Fundamento de Esperanto. Slovaka Eldono.

L.L. Zamenhof. En la slovakon trad. A. Škarvan, N.P. Evstifejev. Partizánske: Espero, 2007. X+111+16p. 18cm. ISBN 9788096953363. Faksimila represo de la eldono 1907. € 7,50

Great Sufi Wisdom. Waris Shah. En Esperanton kaj la anglan trad. S. Ahmad. Rawalpindi: Adnan, 2006. 88p. 21cm. ISBN 9698714030. Selektio de eldiraĵoj de la sufia poeto Waris Shah (1722-92), en la originala pangaba kaj en angla kaj Esperanta tradukoj. € 4,80

Kokoso. Japanaj kantoj en Esperanto, vol. 3. Kolektis Konisi Gaku. Trad. el la japana. Aiti-ken: Beltono, 2006. 59p. 26cm. ISBN 4888870403. Tekstoj kaj muziknotoj por 50 kantoj. € 5,70

Kolza kampo. Japanaj kantoj en Esperanto, vol. 4. Kolektis Konisi Gaku. Trad. el la japana. Aiti-ken: Beltono, 2006. 61p. 26cm. ISBN 4888870411. Tekstoj kaj muziknotoj por preskaŭ 50 kantoj. € 5,70

Kompleta historio de La Verda Stelo. 1907-2007. Red. André Staes. Antverpeno: La Verda Stelo, 2007. 247p. 21cm.

ISBN 9077066300. Ilustrita retrorigardo al 100 jaroj da agado de antverpena E-klubo. € 22,50

Konciza etimologia vortaro. André Cherpillod. Roterdamo: UEA, 2007 (repr). 503p. 21cm. ISBN 9789290170822. La etimologio de pli ol 15000 Esperantaj vortoj, kun parencaj etimoj en pluraj lingvoj. Ĉiuj fremdlingvaj vortoj skribitaj en la alfabeto de la koncerna lingvo. € 21,60. Triona rabato ekde 3 ekz.

Kultura laboro, La. Luciano Bianciardi. En Esperanton trad. P.V. Orlandini. Milano: ExCogita, 2007. 119p. 20cm. ISBN 9788889727430. Rigardo al la vivo de itala maldekstrema intelektulo. € 13,20

Langue pour l'Europe?, Une. Ou: parler d'une même langue en Europe? Jean-Pierre Ducloyer. La aŭtoro, 2007. 48p. 21cm. ISBN 2952097811. Plia pledo por pli saĝa lingvopolitiko en EU. € 6,00

Legolibreto IV. Red. J. Drahotová, K. Votoček. 2007. 80p. 21cm. Plia volumo en serio de popularaj legolibretoj. € 3,90

Mil vortoj en franca hejmo. Mille mots pour la maison. Jean-Pierre Ducloyer. Rennes: FEB, 2007. 80p. 21cm. ISBN 2952097828. Eĉ se ne tre ampleksa, tiu ĉi du-lingva (franca, E) vortareto de hejmaj terminoj povas esti tre utila. € 6,00

Nun ni komprenas ... kaj aliaj porinfanaj teatraĵetoj. Paul Gubbins. Barlaston: EAB, 2007. 36p. 21cm. Kvin ilustritaj teatraĵetoj. € 6,90

Rememoroj pri tempo de silko kaj pajlo. Portreto de japana urbeto. Ĵuniĉi Saga. En Esperanton trad. J. Szczerbicka-Yamato. Jelenia Góra: AD REM, 2006. 265p. 25cm. ISBN 8389863464. Bele ilustrita monografio pri urbo en la provinco Tsuĉiura, nord-oriento de Tokio. € 31,20


Suno sur la tablo. Rakontoj pri lumigo.

M. Iljin. El la rusa trad. A. Kerbel. Hajfo: La tradukinto, 2007. 44p. 21cm. Porinfanaj sciencopopularigaj rakontoj pri la historio de lumigado. € 4,50

Tra la mondo per biciklo kaj Esperanto. Lucien A. Peraire. Beauville: SAT-Broŝurservo – Laŭte!, 2007 (3-a eld). 107p. 21cm. Rakonto pri unika vojaĝo de franca laboristo en 1927-1932. € 3,60

Universalaj Lingvoj en Svislando. Andreas Künzli. La Chaux-de-Fonds: SES / CDELI, 2006. 1129p. 24cm. ISBN 2970042525. Abunde ilustrita. Impona enciklopedio pri personoj, organizaĵoj, urboj, iel ligitaj al Volapük, Esperanto, Ido, Occidental-Interlingue, Interlingua; enhavas ankaŭ malgrandan, sed trafe elektitan krestomation de tekstoj rilataj al la temo. € 66,00

Vikipedio — praktika manlibro. Red. Yves Nevelsteen. Partizánske: Espero, 2007 (2-a eld). 39p.



15cm. ISBN 9788096953332. Kolorilus. Praktika manlibro por ĉiu, kiu interesiĝas pri la reta, libera enciklopedio „Vikipedio“. € 3,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Wise Owl Grammar!

Angela Tellier, Simon Davies. 2007. 20+15p. 30cm. Anglalingva; kolorilus. Laborkajero por instruistoj kaj infanoj partoprenantaj en la projekto Springboard to languages; kun klarigaj notoj. € 6,00

Yong zhijiefu xuexi shijieyu. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la ĉinan trad. Liu Haitao. Martin: La aŭtoro, 2007. 114p. 25cm. ISBN 9788096966738. Komplete ilustrita 22-leciana kurso por ĉinlingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50

Nelibroj

Afiŝo „La alfabeto de Esperanto“. [2007]. 70x50cm. Plenkolora afiŝo + aparta folio por instrui la Esperantan alfabeton. € 2,10

Israelo: Memorfolio: 120 jaroj de Esperanto. 2007. 20x14cm; en plasta koverto. Sur unu flanko bildoj de L.L. Zamenhof kaj de la Unua Libro en la angla + surgluita kaj porokaze stampita poŝtmarko pri Esperanto, eldonita de la israela poŝto. Dorse, du-lingva (hebrea, E) klariga teksto. € 9,90

Jen nia mondo. La Dialogoj 1-25. Barlaston: EAB, 2007. 72min. Ĉiuj dialogoj de la populara lernolibro. KD. € 6,60

Milan Dočekal el la grupo TEAM' kantas (ne nur) en Esperanto. Martin: Milan Dočekal, 2007. 24min. Tri pecoj en Esperanto kaj tri en la slovaka. KD. € 15,00

DUMVIVAJ MEMBROJ

Britio: G. Sutton. Japanio: K. Takahasi, A. Yasumitu. Usono: E. Eddy.

PATRONOJ DE TEJO

Aŭstralio: J. Bishop. Britio: M. H. McClelland. Francio: P. Bérizzi, F. Dhersignerie, P. Lelièvre. Israelo: G. P. Savio. Japanio: Y. Yasumura. Nederlando: S. Idzerda. Usono: S. Cobb, P. Lynch.

SOCIETO ZAMENHOF

Belgio: M. Cwik. Bulgario: O. Gerasimova. Ĉinio: J. R. Wang, X. Wang. Danio: T. Bak, A. Casper-Mortensen, H. Claesson, F. Jørgensen. Francio: F. Bartsch, J. Bartsch. Germanio: O. Walz. Japanio: T. Sugano. Kanado: B. Crisp, M. Meijer-Brandsma. Kroatio: Katja & Ivo Osibov. Nederlando: Ans & Hans Bakker, R. Bossong. Norvegio: T. Jansson. Svedio: U. Luin, L. Nordenstorm, S. Olsson. Usono: G. Grady, Lucy & William Harmon, R. Jaderstrom, B. A. Sherwood, D. Simpson, R. Swenson, A. Victor.

DONACOJ

Ĝis la 1-a de junio 2007

Ĝenerala kapitalo: Nederlando: S. A. K. van der Zee (legaco) 453,78. Sumo ĉi-jara: 4909,08.

Konto Afriko: Britio: G. Sutton 100,00. Nederlando: C. & R. Bossong 50,00. Svedio: J. Hammarberg 53,91; U. Luin 30,00. Sumo ĉi-jara: 1401,53.

Fondaĵo Ameriko: Nederlando: A. & H. Bakker 1000,00. Svedio: J. Hammarberg 54,03. Usono: S. Lawton 35,37; J. Schwartz 14,74. Sumo ĉi-jara: 1626,99.

Fondaĵo Azio: Japanio: K. Gotoo, T. Itabasi, M. Nisida, T. Saito, Z. Shayama – po 12,50; M. Isaki, S. Nagura, A. Sato – po 25,00; T. Arai 12,28; T. Tadaisi 62,50. Sumo ĉi-jara: 897,13.

Fondaĵo Canuto: Britio: G. Sutton 100,00. Francio: G. Boissière 100,00; G. & M. Gourichon, M. Savignat-Belhôte – po 30,00; C. Becheret 8,00; R. Lebrun 10,00;

F. Dhersignerie, L. Négron, B. Robineau – po 50,00; C. Common 20,00; J. Poux, M. Prezioso – po 6,00. Nederlando: A. E. Moerbeek-Prins 100,00. Sumo ĉi-jara: 2932,56.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Aŭstralio: A. Bishop 30,30. Francio: M-T. Lloancy 8,00; M. Basso, G. Gourichon – po 20,00; C. Common 25,00; R. Hardy 43,00; G. Darrieux, L. Négron – po 50,00. Sumo ĉi-jara: 2032,30.

Volontula Fondaĵo: Nederlando: A. & H. Bakker 772,00. Sumo ĉi-jara: 822,00.

Domrenovigo: Nederlando: A. & H. Bakker (Biblioteko) 2192,60. Sumo ĉi-jara: 4208,60.

Ĝenerala kaso: Britio: A. Prent 16,18. Greklando: H. H. Vacal 2,00. Nederlando: A. Bakker 600,00. Svedio: S. Fjordland 122,81; U. Luin 50,00. Usono: M. Kelly 2,95; J. Young 20,00. Sumo ĉi-jara: 3598,79.

Al ĉiuj koran dankon! UEA

Jarlibro 2007 aperis

Portreto de Antoni Grabowski (1857-1921) malfermas la ĉi-jaran Jarlibron de UEA omaĝe al la 150-a datreveno de la granda poeto-tradukisto, kiu grave influis la evoluon de la nova lingvo.

La apero de la Jarlibro preskaŭ koincidis kun lia naskiĝtago la 11-an de junio. En la antaŭparolo Renato Corsetti, por la lasta fojo kiel prezidanto de UEA, traktas la rolon de tiu ĉi plej populara Esperanto-libro, al kiu la evoluo de komunikrimedoj nun metas aliajn defiojn ol en la tempo, kiam Hector Hodler redaktis ĝin.

Kun 1733 adresoj en 102 landoj la Jarlibro havas 56 delegitojn malpli kaj 3 landojn pli ol pasintjare, kiam estis 1789 delegitoj en 99 landoj. Estas 53 ĉefdelegitoj (52 en 2006), 976 (1006) lokaj delegitoj, 118 (116) vicdelegitoj, 39 (40) junularaj kaj 1295 (1333) fakaj delegitoj. Krome en Brazilo estas 5 regionaj delegitoj. La fakdelegitoj reprezentas preskaŭ 800 fakojn. La nombro de kontakt-informoj pri lokaj kluboj restas sama kiel pasintjare, 81 en 28 landoj. La proporcio de rete atingeblaj delegitoj plu kreskis, kvankam la jaro de rapida kresko jam pasis. Entute 1223 (70,6%) delegitoj anoncas retadreson. En *Jarlibro 2006* ili estis 1233 (68,9%).



En la unua parto de la Jarlibro, eldonita ankaŭ aparte kun la titolo *Gvidlibro 2007*, aperas adresoj k.a. informoj pri la organoj, instancoj kaj servoj de UEA kaj TEJO, pri landaj kaj fakaj asocioj, Akademio de Esperanto, edukaj kaj kulturaj organizaĵoj, bibliotekoj ktp. Tie legeblas ankaŭ la Esperanto-rezolucioj de Unesko kaj la Gvidlinioj por informado de UEA. La Jarlibro enhavas krome anoncojn kaj rabatkuponon de la Libroservo de UEA.

Individuaj membroj de UEA povas profiti de la informa trezoro de la Jarlibro ankaŭ rete. Krom facila uzebleco por rapida serĉo de delegitoj k.a. informoj, avantaĝo de la reta Jarlibro estas ĝia ĝisdateco. Pere de la reta Jarlibro eblas krome sendi retmesaĝojn al delegitoj kaj akiri por si plusendan retadreson kun la finaĵo @uea.org. Uzantoj de la reta Jarlibro, kies kotizo rajtigas ricevi la revuojn *Esperanto* aŭ *Kontakto*, povas legi ilin rete jam, kiam ili estas presataj, kaj daŭre disponi pri la antaŭaj numeroj ekde la jarkolekto 2004. Por ekuzi la servon necesas registriĝi ĉe <http://reto.uea.org>, alirebla ankaŭ per la ligilo „Jarlibro“ sur la startpaĝo de www.uea.org. Meze de junio tiu ĉi servo, enkondukita en aprilo 2005, havis 1450 uzantojn. En sia antaŭparolo Renato Corsetti dankas la kreinton de la reta Jarlibro: *Mi kredas ke Hector Hodler en la transmondo estas aparte fiera pri Andrej Grigorjevskij, kiu realigis la retan Jarlibron, kaj pri UEA, kiu komisiis la realigon.* (GK)

100 jaroj de Esperanto en Slovakio

Dum la lasta maja semajnofino Esperanto festis sian centjariĝon en Slovakio. Kongreso de ties landa asocio okazis en la urbo Martin, kie antaŭ 100 jaroj aperis la unua lernolibro de Esperanto por slovakoj. Eldonis ĝin la tolstojano d-ro Albert Ŝkarvan. La kongreson ĉeestis sesdeko da personoj el kvin landoj.

Paralele kun la kongresa programo okazis la jam tradicia „Mezeŭropa Konsultiĝo“, dum kiu reprezentantoj de Landaj Asocioj de mezeŭropaj landoj interŝanĝas siajn spertojn kaj planojn, kaj informas pri la agado en sia lando. Ĉi-jare ĝi okazis kun la ĉeesto de la junularaj reprezentantoj, estraranoj de Landaj Sekcioj de TEJO. La Konsultiĝon ĉeestis reprezentantoj el Slovakio, Ĉeĥio, Pollando, Hungario kaj Aŭstrio, kaj Georgo Handzlik kiel reprezentanto de EEU. La „bardo sen barbo“ kontribuis ankaŭ al la muzika parto de la kongreso, per unuhora koncerto.

La solenaĵojn grave subtenis la urbaj instancoj. Dank' al ilia malavara subteno estis eldonitaj 10 mil informiloj pri Esperanto, reeldonita la unua lernolibro, ĉiuj urbaj muzeoj estis senpagaj por la ĉeestantoj, la eksterlandanoj ĝuis senpagan restadon. Martin kandidatiĝas por la titolo „Eŭropa urbo de kulturo“ de la jaro 2013 kaj kaze de la venko



Parto de la partoprenantoj. Fotoj: Stano Marček

proponis okazigi tiujare grandan E-aranĝon (UK, IJK, EEU-kongreso?).

La kongreso „naskis“ novan estraron, kiun gvidos Rastislav Šarišský. Kantis Milan Dočekal el la grupo TEAM, estis prezentitaj noveldonitaj libroj, okazis prelegoj pri la 100-jariĝo de Esperanto en Slovakio, vizito de la Muzeo de Martin Benka (nacia artisto, pentristo kaj esperantisto) kaj de la Nacia tombejo, kie estas entombigitaj kelkaj gravaj slovakaj

esperantistoj. La kongresanojn dancis la grupo Kečka (la KD *Kantoj de l' popolo*), okazis kvizo, kulturaj programeroj kaj tombolo, estis prezentitaj novaj lerniloj de Stano Marček, prelegis Viliam Búr pri internaciigo de komputilaj programoj kaj Marček pri Alberto Ŝkarvan. La nova prezidanto prezentis la prioritatojn kaj agad-planon por la sekva periodo kaj ĉe la fino oni vizitis la lokan subĉielan muzeon pri slovakaj vilaĝoj.

Peter Baláž



Milan Dočekal

La 9-a Tago de Pioniro

Korea Esperanto-Asocio festas la Tagon de Pioniro unutage en ĉiu majo ekde la jaro 1999, por ke oni memoru la kontribuon de forpasintaj pioniroj, kiuj aktivis la por Korea Esperanto-movado.



Ĉiu jare KEA eldonas memorlibron de la prilumata pioniro kun ne nur liaj/ŝiaj skribaĵoj kaj resumita biografio, sed ankaŭ rememoraĵoj pri la pioniro verkitaj de la amikoj, posteuloj kaj familianoj.

Ĉi-jare okazis la 9-a Tago de Pioniro sabate la 12-an de majo en Hankuk-Universitato de Fremdaj Studoj, kie oni omaĝis al la pioniro Elpin AN U-seng (1907~1991), per la eldono de memorlibro *La Literatura Mondo de Elpin* (kun 203 paĝoj, verkita de LEE Young-Koo). En la kunveno ĉeestis entute 69 partoprenantoj, inkluzive la reprezentantojn de la familio de la honorata pioniro.

La pioniro AN U-seng, naskita en la provinco Hŭanghe-do, norda Koreio, estis patrioto kontraŭ la japana kolonia regado de Koreio. Li ĉefe aktivis en Ĉinio kaj instruis Esperantan poezion en la universitato Zhungshan, Ĉinio, kie li lernis Esperanton.

Li verkis kaj tradukis el la ĉina kaj korea multajn poemojn, novelojn kaj romanojn. Unu el ili estas *La Taglibro de Frenezulo* de LU Sin (*Orienta Kuriero*, aprilo 1939).

En la poemoj, noveloj kaj romanoj li batalis kontraŭ la maljusteco de la japana imperio, akuzis pri militaj kruelaĵoj kaj agitis por movado kontraŭ-japana kaj korea sendependiĝo.

Kim Uson

AKEL-2: Renkontiĝo en Bulgario

Esperanto-geinstruistoj en Bulgario, Italio, Britio kaj Hispanio efektivas la porlernejan projekton AKEL – Alternativa komunikado inter eŭropaj lernejoj por konstrui la mondkoncepton de la junaj homoj en unuiginta Eŭropo (Socrates kaj Comenius).

Ankaŭ Litovio eniras la teamon, kvankam monapogon de Socrates ĝi ne ricevis. Laŭ invito de la kunordiganta bulgara lernejo, tri lernantinoj de la oka lernojaro el la distrikto de Joniŝkis, kaj ilia instruistino Liepinia Genovaitė, partoprenis en laborsemajno de la projekto AKEL-2, okazanta de la 15-a ĝis la 22-a de aprilo en la mezlernejo de Canko Cerkovski en Polski Trambeŝ, Bulgario. La temo de la renkontiĝo estis: *Kutimoj kaj tradicioj aŭ kiamaniere festas mia popolo*.

Ĉiu lerneja teamo montris preparitan komputilan prezentaĵon, enhavantan materialon pri la temo, alportis aĵojn por la komuna ekspozicio kaj partoprenis en internacia koncerto en la urba Kulturdomo. Eseoj de gelernantoj laŭ la temo *Eŭropcivitanejo* estas kolektataj por aparta eldonaĵo.

Ni prezentis filmitan materialon pri Litovio; ekspoziciis elektitajn manlaborojn de gelernantoj el Gataučiai, desegnaĵojn pri patrujo de la lernantino Reda Stankūnaitė el Linkaičiai, porpaskajn tranĉaĵojn de papero el mezlernejo en Meškuičiai, distrikto de Šiauliai. Dum la internacia koncerto pianludis nia lernantino Mylita

Žemekaite, esprime deklamis Reda kaj Akvilė Jakubkaitė en la litova, kaj kantis Akvilė kaj Mylita.

La bulgara lernejo prezentis por la partoprenantoj porpaskan spektaklon en perfekta Esperanto; gvidis lecionon, kiamaniere oni preparas bulgaran nacian ornamajon „martenico“, kaj ravis nin per energiaj popolaj dancoj.

Mirigis nin la belega naturo. En Litovio ĵus komenciĝis printempo, dum en Bulgario ĉio plenverdis. Jam floris tulipoj, violoj kaj multaj arboj. Pleje impresis nin la montoj. Ne la kutimaj montetoj kiel en Litovio, sed altaj montoj kovritaj de neĝo.

Dum la semajno ni povis komunikiĝi kun tre afablaj kaj interesaj homoj. Unu vespero pasigita en klubejo kun la loka junularo ne apartenanta al la projekto, montris la gravecon koni kelkajn fremdajn lingvojn...

Ni multe ekskursis, vizitis la plej belajn lokojn en Bulgario – la monaĥejon de Rila, la ĉefurbon Sofio, la belajn urbojn Plevnen, Trojan, impresajn muzeojn. Ni estis oficiale akceptitaj en la urbodomo de Polski Trambeŝ kaj en la regiona centro de Veliko Tŕrnovo.

Liepinia Genovaitė



Svend Dragsted (1923-2007) mortis la 30-an de aprilo en Holte (Danio), kie li iam estis delegito. Li estis prezidanto de Centra Dana E-ista Ligo 1954-62, poste redaktoro de ĝia gazeto. Li aŭtoris *Esperantogrammatik* (1953) kaj *Miniatura vortareto dana-Esperanta* (1964).

Antonio González Álvarez (1947-2007) mortis la 31-an de januaro en Torrox (Hispanio). Li organizis 4-foje Andaluzian E-Kongreson, akiris urban decidon nomi avenuo laŭ Esperanto, kaj kunlabore kun Esperantotur aranĝis turismadon de centoj da pojoj en Hispanio.

Marcel Lloberas Ribal (1913-2006), UEA-ano ekde 1953, forpasis la 19-an de decembro en Terrassa (Hispanio), kie li pli ol 40 jarojn estis delegito kaj fakdelegito pri paco kaj sociala humanismo.



Trond Øgrim (1947-2007), dumviva membro de UEA, mortis la 23-an de majo en Oslo. Li estis konata en Norvegio kiel radikala politikisto, verkisto kaj prelegisto. Li interesiĝis pri lingvoj kaj interreto kaj ĉeestis

en pluraj UK-oj k.a. aranĝoj, en kiuj li partoprenigis ankaŭ triamondanojn kaj siajn junajn filinojn. En 1989 li aŭtoris felietonon *La revo pri la perfekta lingvo* pri Solresol, Volapuko, Esperanto k.a. planlingvoj en la Norvega Radio.



John (Johano) Rapley (1927-2007) forpasis la 9-an de junio, nur dek tagojn antaŭ sia 80-jariĝo. Li estis la lasta direktoro de la Centra Oficejo de UEA en la vilaĝo Heronsgate apud Londono. Esperantisto de 1944 kaj membro de UEA ekde 1945, li eklaboris en la CO en 1951 kaj estis ĝia direktoro (tiam nomata sekretario) de novembro 1954 ĝis septembro 1955, post kiam la CO translokiĝis al Roterdamo. Post kariero kiel kontisto en ŝipkomerco li laboris ankaŭ en la Roterdama CO kiel kontisto en du periodoj, 1983-86 kaj 1990-92. En 1992 li aldone redaktis la Jarlibron. Lia granda amo estis libroj, pri kio atestis lia ampleksa biblioteko. Longe li estis ankaŭ fakdelegito pri bibliotekoj. En lia esperantigo aperis la Unesko-eldonaĵoj *Kulturo kaj teknologio* (1997) kaj *Kulturo kaj evoluo* (1998),

kaj *Monda Federacio?* de R.J. Glossop (2001). Vivante ankoraŭ en Londono li aktivis en la Londona E-Klubo, kies honora vicprezidanto li fariĝis, kaj kiel peranto de SAT. Laste Rapley kaj la edzino Helga vivis en Francio, i.a. kelkajn jarojn en la vilaĝo Bouresse, helpante en La Kvinpetalo.

Danko Rehoříč (1927-2007) mortis en Zagrebo la 7-an de majo. Li estis aktiva

kursgvidanto kaj preleganto en pedagogiaj seminarioj en la E-kampadejo en Primošten. La emblemo de la 38-a UK (Zagrebo, 1953) estis desegnita de li.

Bryce Waters (1924-2007) forpasis la 20-an de majo en Burnaby BC (Kanado). Li estis dumviva membro de UEA kaj de la 60-aj ĝis la 80-aj jaroj aktiva en la Vankuvera E-Societo kiel kasisto kaj sekretario.

Anoncetoj



Unu vorto = 1 internacia rpk (€ 0,89).

Ni ne respondecas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ Koresponda Servo Mondskala, B.P.6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.

Dezirás korespondi kun neŝatantoj de la nuna vivmodelo: perforto (inkl. bestojn), detruado de la naturo, mensogoj, ktp. Olinto Ramos Filho, Rua Vigário José Inácio, 481 sala 53, BR-90020-100 Porto Alegre – RS, Brazilo; rete: olintorf_1999@yahoo.com.

La kopenhagaj kluboj KEK/DEFA kunvenante ĉiun lundon vespere (escepte de julio) bonvenigas vin en sia kunvenejo: Kulturhuset, Dortheavej 61, 2400 NV. Tel.+45 38 89 10 13. chatterjeebetty@hotmail.com / niemann@kabelmail.dk.

Kvar senpagaj libroj por E-bibliotekoj (naciaj, urbaj, E-kluboj). Pri plibonigo de nia vivo dum rilatoj, nutrado ktp. Aŭtoro : O. M. Aivanhov. Tradukis Claude Piron. Vidu http://www.prosveta.ch/izvor91_eo.html. Mendu ĉe Eldonejo Prosveta, CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando.

Feliĉu, eblas! Kiu ankoraŭ ne ricevis tiun senpagan broŝuron, petu ĝin ĉe Eldonejo Prosveta, CH-1808 Les Monts-de-Corsier, Svislando. Aŭtoro : O. M. Aivanhov. Tradukis Claude Piron. Vidu http://www.prosveta.ch/izvor91_eo.html.

LINGVE KAJ...



Al lingva demokratio. Aktoj de la 1-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Prago, 1996. Red. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Rotterdam: UEA, 1998. 212p. 24cm. Trilingva: (E, angla, franca). €10,20.



Al nova internacia lingva ordo. Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Pekino, 2004. Red. Lee Chong-Yeong kaj Liu Haitao. Rotterdam: UEA, 2004. 239p. 24cm. Trilingva (E, angla, ĉina). €18,00.



Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko. Robert Phillipson. Trad. István Ertl. Rotterdam: UEA, 2004. 254p. 22cm. €21,00.



Studoj pri la Internacia Lingvo. Red. Michel Duc-Goninaz. Gent: AIMAV, 1987. 155 p. 24cm. Naŭ eseoj interlingvistikaj en la franca, angla, germana kaj Esperanto. €6,00.




Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj. Jordi Bañeres kaj Miquel Strubell. Trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 2002. 59p. 22cm. €7,50.



Por aktiva lingvopolitiko. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81a UK, Prago 1996. Red. D. Blanke, R. McCoy kaj O. Buller. Rotterdam: UEA, 1999. 71p. €7,10.

*Ĉe la Libroservo de UEA:
triona rabato por minimume tri ekzempleroj senditaj samtempe al la sama adreso.*



**La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.**

Redaktas: Humphrey Tonkin,
Frank Nuessel, Mark Fettes.

Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.

Individua abono: 70,00 eŭroj

Institucia abono: 184,00 eŭroj

Abonu pere de la Libroservo de UEA.

...MOVADĖ



Lingvo kaj popolo. Humphrey Tonkin. Prelegaro. De lingvo kaj ĝia rolo ĝis esploroj kaj estonteco, tralingvopolitiko, lingvokultivado, eksteraj rilatoj, strukturoj k.a. Rotterdam: UEA, 2006. 159p. 21cm. €14,10.



Jubileo. Jarcento de Esperanto. Redaktis Mark Fettes. Div. aŭtoroj. Rotterdam: UEA, 1988. 164 p. 24cm. Belaspekta kolekto de artikoloj, raportoj kaj fotoj el la Jubilea Jaro. €3,00.



Kio ni estas kaj kion ni celas. Komentoj pri la Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto. Red. R. Corsetti, O. Buller. Rotterdam: UEA, 1999. 24 p. 30cm. €4,50.



Praga Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto. Plurlingva: E-angla-araba-ĉina-franca-hispana-rusa. Rotterdam: UEA, 2000. 19p. 21cm. €2,10.



La danĝera lingvo. Ulrich Lins. Dokumentita historio pri la atakoj kontraŭ la E-movado, precipe sub Hitler kaj Stalin, sed ankaŭ en cara Ruslando, orienta Azio kaj en la Ligo de Nacioj. Moskvo: Progreso, 1990 (2a eld). 568p. 20cm. Bind., ilustr. €21,00.



Monumente pri Esperanto. Red. Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabeloj. 24cm. €7,50.



Sed homoj kun homoj. Universalaj Kongresoj de Esperanto 1905-2005. Ziko Marcus Zikosek. Ilustrita rigardo super la ĉefa kaj plej granda regula renkontiĝo de esperantistoj. Rotterdam: UEA, 2005. 197p. 24cm. Broŝ. €16,50, bind. €22,50.



Afero de espero. Konciza historio de la Esperanto-movado en Afriko. Heidi Goes. La unua provo de historio de la E-movado sur la nigra kontinento; kovras la periodon de la komenco ĝis la jaroj 1990. Rotterdam: UEA, 2007. 86p. 21cm. Ilus. €9,00.

Ĉe la Libroservo de UEA, triona rabato por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj de sama titolo.
Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Telefona: +31 10 436 1044 Telefaksa: +31 10 436 1751 Retpoŝto: <libroservo@co.uea.org>